

4. Sympozjum Interlingwistyczne / 4a Interlingvistika Simpozio /
4th Interlinguistic Symposium
21-22.09.2017, Adam Mickiewicz University in Poznan, Poland

Abstrakty/Resumoj/Abstracts

HEBREW – A JEWISH <i>LINGUA FRANCA</i>	5
ANGELIKA ADAMCZYK	5
THE UNORTHODOX CONTRIBUTION OF SILVIO GESELL TO THE ESPERANTO MOVEMENT	5
JAVIER ALCALDE	5
SYLVIA PANKHURST AND THE INTERNATIONAL AUXILIARY LANGUAGE	6
BAŞAK ARAY.....	6
KOMPARO DE PAROLOJ EL RETORIKA VIDPUNKTO	6
BENGT OLOF ÅRADSSON.....	6
KONCEPTO DE LA STUDOBJEKTO INTERLINGVISTIKO	7
VĚRA BARANDOVSKÁ-FRANK	7
ETNOLINGVA INFLUO KAJ LINGVOŝANĜIĜO EN ESPERANTO	8
CYRIL BROSCHE	8
KREMATORIUMS-ESPERANTO	9
TOMASZ CHMIELIK	9
ĈU LA ESPERANTO-LITERATURO BONFARTAS?	10
TOMASZ CHMIELIK	10
BASIC ENGLISH, CHURCHILL KAJ ESPERANTO	10
RENATO CORSETTI.....	10
KIEL KREI FIDINDAN ESPERANTO-VORTARON?	11
MARCOS CRAMER	11
SCIENC-PRAKTIKAJ STUDOJ PRI ESPERANTO EN UKRAĪNIO	11
NINA DANILJUK.....	11
KOMUNUMO KAJ MOVADO	12
JOHAN DERKS.....	12
KIAN FONOLOGION DISPONIS ZAMENHOF?	13
NICOLAU DOLS SALAS	13
ESPERANTO AND THE MARKET STATE	13
MICHAEL FARRIS	13
<i>Esperanto kaj la Merkato Ŝtato</i>	13
<i>Esperanto i Państwo Rynkowe</i>	14

ESPERANTO – ĈU LINGVO POR LUDADO KAJ ŜERCADO?	14
SABINE FIEDLER	14
TAKE MY WORD FOR IT	15
RICHARD FORSYTH.....	15
<i>Prenu mian vorton</i>	16
TOWARD AN INTERCULTURAL LINGUISTIC REPERTOIRE	17
AGNES HE.....	17
POLITYKA WIELOJĘZYCZNOŚCI W HISZPANII	17
MACIEJ JASKOT	17
THE EMERGENCE OF CYBER LINGUA FRANCA IN THE DIGITAL AGE: A HOPE FOR LINGUISTIC EQUALITY OF THE WORLD	18
KATADA FUSA / 片田 房	18
POLSKIE PODRĘCZNIKI DO NAUKI JĘZYKA VOLAPÜK Z LAT 1888-1889 JAKO TEKSTY PROPAGUJĄCE IDEĘ JĘZYKA MIĘDZYNARODOWEGO	18
IRMINA KOTLARSKA	18
20 JAROJ DE LA INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ EN UAM	19
ILONA KOUTNY	19
HISTORIO DE LA KER-EKZAMENOJ	20
KATALIN KOVÁTS.....	20
KOMPARO DE LA AMHARA KAJ ESPERANTA VORTFARADOJ	20
MICHAŁ KOZICKI	20
KIAL LA HISPANA NENIAM ROLIS KIEL INTERLINGVO EN FILIPINAJ INSULOJ	20
FÉLIX MANUEL JIMÉNEZ LOBO	20
WYMÓG ZNAJOMOŚCI JĘZYKA OFICJALNEGO JAKO WARUNEK UZYSKANIA OBYWATELSTWA W WYBRANYCH KRAJACH EUROPEJSKICH W ŚWIETLE OBOWIĄZUJĄCYCH PRZEPISÓW – STUDIUM PORÓWNAWCZE	21
KATARZYNA KUBASZCZYK	21
<i>Requirement of knowledge of the official language as a condition of obtaining citizenship in selected European countries in the light of the applicable legislation – comparative study</i>	21
THE EFFECTS OF THE LANGUAGE POLICY IN CHINA	21
MARIA KURPASKA	21
BALDUR RAGNARSSON KAJ EDWIN DE KOCK - ELSTARAJ NUNTEMPAJ ESPERANTAJ POETOJ	22
LIDIA LIGĘZA.....	22
LINGVA SUBPREMADO KAJ NUNTEMPA AKADEMIO	23
VICENTE MANZANO-ARRONDO.....	23
ESPERANTISTARO – KIA SOCIUMO?	23
ALEKSANDER MIELNIKOW	23
LA FREINET-PEDAGOGIO, TEORIE KAJ PRAKTIKE	24
MONIKA MOLNÁR.....	24

D-RO ESPERANTO EN SOVIETUNIO: ZAMENHOF, MARR KAJ LA (LINGVA) REVOLUCIO	25
SÉBASTIEN MORET	25
<i>Dr Esperanto in the Land of the Soviets: Zamenhof, Marr, and the (Linguistic) Revolution</i>	25
NORDAFRIKA ALIECO: KOLONIAJ TRAJTOJ EN LA VERKOJ DE RIBILLARD KAJ NEWELL.....	25
XESÚS MUIÑOS PARDAVILA.....	25
NUNTEMPA LINGVA SITUACIO EN MULTNACIA KAZAĤIO.....	26
WIACZESŁAW NASRETDINOW	26
ADAPTO DE PRUNTVORTOJ EN ESPERANTO	26
KARINA GONÇALVES DE SOUZA DE OLIVEIRA.....	26
<i>Adaptation of loanwords in Esperanto</i>	27
KONO DE FREMDAJ LINGVOJ EN OKCIDENTA EŬROPO LAŬ GENERACIOJ SURBAZE DE EŬROBAROMETRO-ENKETOJ	27
JUKKA PIETILÄINEN	27
LA PLURFUNKCIA ROLO DE LA ESPERANTA RADIOFONIO	28
BARBARA PIETRZAK	28
SAUSSURE EN KAJ PRI ESPERANTO	28
LUIZ FERNANDO DIAS PITA.....	28
ŜEKSPIRO OR SHAKESPEARE: THIS IS THE QUESTION! ON A PROPER ADAPTATION OF PROPER NAMES IN ESPERANTO	28
KRUNOSLAV PUŠKAR.....	28
RIMARKOJ PRI LA LINGVA NORMO EN ESPERANTO	29
RYSZARD ROKICKI.....	29
LA LINGVOKONSCIIGA ROLO DE ESPERANTO	30
ANDRÉ STAES	30
JĘZYK MIĘDZYSŁOWIAŃSKI	31
JOHANNES HENDRIK VAN STEENBERGEN	31
<i>The Interslavic language</i>	32
ESPERANTLINGVA BILDO DE LA MONDO: JUSTECO	32
IDA STRIA	32
GEORGIAN LANGUAGE: CURRENT THREATS AND CHALLENGES	33
TAMAR SUCHISZWILI	33
ZAMENHOF POETO	34
HUMPHREY TONKIN.....	34
ESPERANTO: A LANGUAGE POLICY ASSESSMENT.....	34
HUMPHREY TONKIN.....	34
HAVAĤOJ PRI LUDOVIKO L. ZAMENHOF EN LA KOLEKTO POR PLANLINGVOJ KAJ LA ESPERANTOMUZEO DE LA AŬSTRIA NACIA BIBLIOTEKO.....	35
BERNHARD TUIDER	35

SERĈANTE FONTOJN DE LA ESPERANTA „HAMLETO” EL 1894 – ĈU LUDOVIKO ZAMENHOF UZIS ANKAŬ POLA(J)N TRADUKO(J)N?	36
WOJCIECH USAKIEWICZ	36
THE ROLE OF LANGUAGES IN THE EUROPEAN UNION – NOW AND IN THE FUTURE.....	36
REINHOLD UTRI	36

Hebrew – a Jewish *lingua franca*

Angelika ADAMCZYK

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet Warszawski

Hebrew - one of the oldest languages in the world, nowadays is the main official language spoken in Israel (besides Arabic and English) as well as used by Jews living in the diaspora. It has undergone some significant changes and has been exposed to influences of other languages throughout all the steps of its development - since the Biblical times, through the Babylonian exile, the Middle Ages, the Haskala period, its revival in 19th century till the modern times.

The revival of the Hebrew language was the most successful work of any language revitalization in the history and a magnificent realization of Zionist ideology. The phenomenon of its revival lies in the fact that after about 2000 years of not being used for speaking, despite of lack of continuation, Modern Hebrew is nowadays an independent and a vivid language, used in various areas of life and by all representatives of social strata.

This paper is an attempt to explain the reasons for its dying out during the diaspora period as well as to come forth the circumstances of its revival. Furthermore, we will study the nature of Hebrew used nowadays both in Israel and abroad. Finally, we will ask the question if Hebrew may be considered an international language.

The unorthodox contribution of Silvio Gesell to the Esperanto movement

Javier ALCALDE

Włochy/Italujo/Italy, COSMOS, Scuola Normale Superiore

Most of the research on the Esperanto movement has focused on its main organizations, such as Universala Esperanto-Asocio or Sennacieca Esperanto-Asocio, as well as its leaders, such as Zamenhof, Hodler, Lanti or Lapenna. This way, a peripheral or less organized Esperantism has remained unexplored, including the different proposals made by intellectuals and social activists on its behalf in their areas of expertise. They might not have been active members of the main organizations nor participated in the international congresses of the Esperanto movement, but they have contributed to the promotion of its cause. One example is the German economist Silvio Gesell (1862-1930).

With ideas of social reform not far from those of Henry George, Gesell was an influential thinker. "I believe that the future will learn more from the spirit of Gesell than from that of Marx", wrote Keynes. As it will be shown, up to three different projects proposed Gesell, in which Esperanto plays a role. The first, as an international auxiliary language, was put forward at the beginning of the First World War and was linked to peaceful purposes. In the second, Esperanto is the language of communication in an imagined European Economic Community. Thirdly, Gesell suggests that Esperanto could become an official language of Upper Silesia, a territory of Central Europe claimed by both Germany and Poland.

Sylvia Pankhurst and the international auxiliary language

Başak ARAY

Turcja/Turkujo/Turkey, Université Paris 1 Panthéon-Sorbonne

Sylvia Pankhurst was a pioneering figure of socialist feminism who advocated for universal suffrage and against war. Less well-known is her involvement in the movement for an international auxiliary language. In 1927, Pankhurst published a booklet, *Delphos. The Future of International Language*, where she expressed the growing need for a world auxiliary language and her support for Interlingua. A biographically informed study of *Delphos* informs us about the modernist, cosmopolitan and democratic vocation of the international auxiliary language movement in the early 20th century. Indeed, Pankhurst's views on the motivation and principles of an interlanguage-to-come are widely shared by the community, and can be found in her contemporaries as well as predecessors and followers, such as Zamenhof, Couturat, Ogden or Hogben. We will present Pankhurst's support for Interlingua as an example of this scientific humanism that dominated the beginnings of interlinguistics, and relate her language activism to her socialist and pacifist stand.

Komparo de paroloj el retorika vidpunkto

Bengt Olof ÅRADSSON

Szwecja/Svedujo/Sweden, Interlingvistikaj Studoj UAM

Ivo Lapenna, en sia libro *Retoriko*, skribas ke "Ekzistas homoj, kiuj havas naturan talenton konvinke kaj trafe paroli" kaj ke elokventeco estas bazo de la parolarto. La scienca studo, la retoriko, havas longan tradicion en la okcidentaj landoj, originante el la antikva tempo kaj dum la paintaj jarcentoj ĝi estis instruataj en universitatoj kaj lernejoj kaj havis fortan influon tra la socio. En Ĉinio kaj Japanio la tradicioj estas aliaj. Pluraj esploristoj atestas pri la observeblaj diferencoj, en la manieroj verki tekstojn, ĉe gestudentoj de diversaj kulturoj. La hejman kulturon la verkistoj aŭ parolantoj kunportas en siajn tekstojn kaj parolojn kaj tiuj diferencoj povas krei miskomprenon kiam ili venas al ne-hejma kultura cirkonstanco.

Certe ankaŭ en esperantion esperantistoj kunportas siajn kulturajn influojn. Ĉu tiu influo ankaŭ estas observebla? Ĉu tiaj diferencoj, se ekzistas, ankaŭ influas la aŭskultantojn en la estimo de la prelegantoj, ĉar la aŭskultantoj simile prijuĝas la parolojn tra sia kultura filtro.

La jena studo provas esplori ĉu ekzistas tiaj diferencoj ĉe esperantistaj prelegantoj de diversaj kulturaj tradicioj. La studobjektoj estas elektitaj inter la prelegoj farataj dum la 3-a Nitobe-simpozio en la kadro de la Universala Kongreso en 2004, kiu okazis en Pekino. La selektitaj paroloj estis prezentataj en Esperanto kaj la prelegantoj venantaj el kaj okcidento kaj oriento. La elirpunkto per kiu la prelegoj estas studataj estas la retoriko laŭ la romia-greka tradicio.

La jena studo tamen ne sukcesis konfirmi la trovaĵojn faritajn de multaj esploristoj. Kaŭzoj povas esti ke la aro da prelegoj ne estis sufiĉe granda por ke la diferencoj inter la paroloj povu esti atribuaĵoj al la diversaj kulturaj devenoj kaj ne pro diferencoj en la diversaj personecoj de la prelegantoj aŭ pro aparteno al kulturaj subgrupoj. Kvankam la malsukceso pruvi la tezon en la jena studo, la aŭtoro certas ke pli bona metodo kaj pli granda sampla povas montri influon de hejma kulturo ankaŭ ĉe esperantistoj en iliaj parolmanieroj.

Koncepto de la studobjekto Interlingvistiko

Věra BARANDOVSKÁ-FRANK

Niemcy/Germanujo/Germany, Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino

Interlingvistiko ekestis kiel scienco stariganta normojn por helplingvoj, sed tra sia centjara historio ĝi estas komprenata de diversaj aŭtoroj pli kaj pli vaste, kiel interdisciplina sciencobranĉo inkludanta diversajn aspektojn de komunikado, lingvoplanado kaj lingvonormigo, multlingveco, lingvopolitiko, tradukarto, sociolingvistiko, historio kaj literaturon de planlingvoj ktp. Se oni observas ekzemple enhavajn nociojn de la unuopaj vikipediaj difinoj, oni surprize konstata, ke unueca koncepto de interlingvistiko ne ekzistas kaj ĝia gamo enhavas dudekon da specialaĵoj ekde etnolingvoj ĝis traduk-kodoj. Ekde kiam interlingvistiko estas instruata kiel studobjekto, ĝia enhavo adaptiĝas al la specialiĝo de la koncerna instruanto, ekz. lingvistika, historia, informadika, pedagogia – tre malofte unu instruisto povas kompetenti pri ĉio, instru-kolektivo estas dezirinda. Tio koncernas ankaŭ la lernotekstojn. Kvankam mia unua enkonduka lernolibro estis verkita por la studentoj de AISkatedro en Sibiu en la jaro 1995 kiel provizora solvo kun la espero evoluigi en kunlaboro de pluraj fakuloj lernolibron pli kvalitan, la kontentiga solvo ĝis nun ne ekzistas. Dum la instruado de tiu ĉi studobjekto en Poznan mi do instruis laŭ mia propra kompetenteco kaj preferoj de studentoj. La lernotekstoj, reviziitaj kaj aktualigitaj en 2017, enhavas ĉapitrojn:

1. Interlingvistiko kiel scienco
2. Antikvaj interlingvoj
3. Normigo de etnolingvoj
4. Piĝinoj kaj kreoloj
5. Tipologio de planlingvoj
6. Historio de lingvokonstruado
7. Volapük
8. Academia pro Interlingua, Latino sine flexione
9. Delegacio, Ido
10. Occidental
11. Novial
12. IALA
13. Basic English
14. Conlangs, latinidoj
15. Slaviconlangs

Tio ne kovras kompletan interlingvistikan temaron, sed mi kiel filologo ne sentas min kompetenta pri aliaj specialaĵoj. Mi volonte akceptus kunlaboron de fakuloj, kiuj kritike recenzos unuopajn ĉapitrojn kaj kompetente verkos novajn. Cetere, en la lernotekstoj mi uzis multajn laboraĵojn de miaj studentoj, al kiuj mi dankas por iliaj kontribuoj.

The Concept of Interlinguistics as an object of study

Interlinguistics first appeared as a branch of studies devoted to the establishment of norms for auxiliary languages but over its century long history it has been understood by different authors more and more broadly as an interdisciplinary branch of science which includes various aspects of

communication, language planning and standardization, multilingualism, language policy, translation, sociolinguistics, and the history and literature of planned languages among others. A look at the content of individual wikipedia definitions leads to the surprising conclusion that a unified concept of interlinguistics does not exist and its range includes twenty specializations from ethnic languages to translation codes. From the time when interlinguistics was first undertaken as a subject of study its content has adapted to the specialization of a given instructor, whether linguistic, historical, informational or pedagogical. It is very rare for one instructor to have equal competence in all these fields and for this reason a teaching group is desirable. This also concerns teaching texts. Although my first introductory textbook was worked out for the students of the AIS chair in Sibiu in 1996 as a provisional solution with the hope of it evolving, in collaboration with other specialists, into a comprehensive text, this has yet to materialize. While teaching this subject in Poznań I taught according to my own competences and student preferences. The textbook, revised and updated in 2017 contains the following chapters:

1. The science of interlinguistics
2. Early interlanguages
3. Standardization of ethnic languages
4. Pidgins and creoles
5. Typology of planned languages
6. History of language construction
7. Volapük
8. Academia pro Interlingua and Latino sine flexione
9. The delegation and Ido
10. Occidental
11. Novial
12. IALA
13. Basic English
14. Conlangs, Romance conlangs
15. Slaviconlangs

This does not cover all branches of interlinguistics, but as a philologist I do not feel competent in the area of other specializations. I gladly accept the collaboration of qualified specialists who can critically review individual chapters and write others in a competent manner. Further, in the textbook I use many works of my students, whom I thank for their contributions.

Etnolingva influo kaj lingvoŝanĝigo en Esperanto

Cyril BROSC

Niemcy/Germanujo/Germany, Universität Leipzig, MIME

La prelego havas du ĉefajn celojn:

1. Skizi per ekzemploj, kiel multe Esperanto ŝanĝiĝis dum siaj 130 jaroj pro la influo de la gepatraj lingvoj de ĝiaj parolantoj. Al tio apartenas siavice ankaŭ atestoj de lingvoŝanĝigo, kie Esperanto emancipiĝis de strukturoj aŭ pruntaĵoj el la etnolingvoj.

2. Doni superrigardon pri la etnolingvaj influo en la lingvaĵo hodiaŭa je diversaj niveloj de lingvoposedo kaj rilate ĉiujn subsistemojn de la lingvo. La datumoj por tio devenas el la analizo de ampleksa parola tekstaro.

Montriĝos, ke en Esperanto daŭre aktivas dinamiko inter la sistemo de la lingvo kaj la lingva fono de ĝiaj parolantoj.

The influence of ethnic languages and language change in Esperanto

This presentation has two main goals:

1. To outline with examples to what degree Esperanto has changed during its 130 years of existence due to the influence of the native languages of its speakers. To this, in turn, belong cases of attested language change where Esperanto has freed itself from structures or borrowings from ethnic languages.

2. To give an overview of the influences of ethnic languages on the current language at various levels of language mastery and related to all the subsystems of the language. The data for this comes from the analysis of an ample collection of spoken texts.

It will show that in Esperanto there is an ongoing interaction between the system of the language and the language background of its speakers.

Krematoriums-Esperanto

Tomasz CHMIELIK

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza, Literatura Akademio de Esperanto

Prezento de la esploroj pri la interlingvo uzata de la malliberuloj en Auschwitz-Birkenau, kiujn el ĉiuj landoj de Eŭropo oni transportis al tiu plej granda kaj plej terura nacia koncentrejo. Tiu persona komunikilo baziĝis sur la germana lingvo kaj eniris ĉiujn sferojn de la koncentreja vivo. Notindas ankaŭ provoj enkonduki ĝin en verkojn de la pri-Holokaŭsta beletro.

Crematorium-Esperanto

This is a presentation of research on the interlanguage used by the prisoners of Auschwitz-Birkenau, who were brought from many different European countries to the largest and most terrifying Nazi concentration camp. This instrument of communication was based on German and became part of every sphere of camp life. Also worthy of note are attempts to introduce it into works of Holocaust literature.

Ĉu la Esperanto-literaturo bonfartas?

Tomasz CHMIELIK

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza, Literatura Akademio de Esperanto

La respondon al tiu ĉi demando la prelegonto ĉerpas el sia pli ol kvardekjara sperto kiel verkisto, tradukanto kaj lekcianto pri la historio de la literaturo en la Zamenhofa lingvo. Estos pritraktitaj ĉefaj minacoj kaj defioj, antaŭ kiuj staras ĉi tiu literaturo. Lastatempe oni vidas klopodojn ene de la movado, kiuj rekte aŭ kaŝe, malgraŭvole aŭ konscie neglektas kaj kontestas ĝiajn rolon kaj signifon. Rimarkindas ankaŭ ekstermovadaj danĝeroj. Aperas duboj, ĉu Esperanto maturiĝis kaj evoluis ĝis tia grado, por esti plene rekonita kiel literatura lingvo.

Basic English, Churchill kaj Esperanto

Renato CORSETTI

Włochy/Italujo/Italy, Università degli Studi di Roma "La Sapienza"

Nia centra tezo estas, ke la malhelpoj al Esperanto fare de Francujo kaj poste de la anglalingva mondo estis pli efikaj kontraŭ Esperanto ol la abomenaj persekutoj kontraŭ homoj fare de naciismaj aŭ komunismaj registaroj.

Do, ĉi tiu artikolo okupiĝas pri la malhelpoj al Esperanto en la merkatliberismaj ekonomioj pro ilia idearo ĉirkaŭ la rilatoj inter popoloj. Ne temas pri persekutoj kontraŭ danĝera lingvo sed pri malhelpoj kontraŭ lingvo kaj ideo ĝena rilate al la mondordo, kiun ili celas. Tiuj malhelpoj ĉefe konkretiĝas per antaŭenigo de alternativa projekto.

Tute aparte estos pritraktata la okupiĝo de la brita registaro pri la projekto Basic English, kaj iliaj donitaj celoj rilate al la estonta monda lingvo. Ĉio ĉi okazis sen iu ajn aludo al Esperanto, kiu estis superece ignorata en la pluraj tekstoj oficialaj pri la estonteco de la angla kiel lingvo de ĉiuj. Cetere malmultaj scias ke la "interna ideo" de la kreinto de Basic English estis "Estas jam tempo malaperigi ĉiujn lingvojn de la mondo krom la angla".

Basic English, Churchill and Esperanto

The central thesis of this presentation is that obstacles to Esperanto first from France and then by the English speaking world were more effective against Esperanto than the terrible persecution against people by the nazi or communist governments.

This presentation then concentrates on hindrances to Esperanto in free market economies due to ideologies concerning the relations between peoples.

This is not about persecution against a dangerous language but about obstacles against a language and idea disturbing to the world order which they seek. These obstacles mainly manifest themselves as the promotion of an alternative project.

The topic of the British government's engagement with Basic English and their goals related to the future world language will be treated separately . This happened without any reference to

Esperanto, which was completely ignored in official documents on the future of the English language for everyone. Further, few people know that the "internal idea" of the creator of Basic English was the gradual disappearance of existing languages in favor of English .

Kiel krei fidindan Esperanto-vortaron?

Marcos CRAMER

Luksemburg/Luksemburgo/Luxembourg, Université du Luxembourg

Multaj el la lingve plej spertaj Esperantistoj opinias, ke nek PIV nek ReVo estas fidinda, kaj ke progresantoj devas uzi tiajn vortarojn singarde, kiam ili perfektigas sian Esperanton. La kialoj por tiuj juĝoj estas diversaj: PIV estas ofte konsiderata tro franceca, tro neologismema kaj misinstrua pri la statuso de ŝajn-afiksoj. ReVo estas ofte konsiderata kiel kelkrilate restanta je la nivelo de PV de 1930, kaj tro influita de unuopa kontribuinto. Progresantoj nun ofte serĉas konsilon en interretaj forumoj kiel Lingva Konsultejo sur Fejsbuko aŭ la dulingva (angla/Esperanta) forumo *Esperanto Language StackExchange*. Tie lingve spertaj Esperantistoj donas rekomendojn pri la lingvouzo, kiuj ofte estas pli utilaj ol la informoj troveblaj en niaj ĉefaj vortaroj. Sur *Esperanto Language StackExchange* aldone estas voĉdonsistemo, kiu certigas, ke vaste subtenataj respondoj aperas plej supre. Tiu sistemo ĝenerale kondukas al rekomendoj pli fidindaj ol tiuj de ajna unuopa vortaro. Sed tiuj utilaj rekomendoj troviĝas en loko apartigita de ReVo kaj la reta PIV, kaj do estos ignorataj de multaj uzantoj de tiuj vortaroj.

Mi ĉi-prelege faros praktike realigeblan proponon pri tio, kiel oni povus plievoluigi la enhavon de PIV kaj/aŭ ReVo per vikiaca sistemo, kiu inkluzivus forumon por pridiskuti specifajn lingvajn demandojn, kaj kiu sisteme donus pli da pezo al opinioj kaj redaktopropoj venintaj de lingve spertaj kontribuintoj kompare al tiuj de lingve malpli spertaj kontribuintoj. La pesado de la kontribuoj okazus parte surbaze de meritoj, kiujn la koncerna kontribuinto akiris ekster ĉi tiu projekto, ekzemple kiel verkinto de vortaro aŭ kiel Akademiano, kaj parte surbaze de la aliaj kontribuoj, kiujn la koncerna kontribuinto faris al ĉi tiu vortara kaj lingvo-foruma projekto. La averaĝa kvalito de la kontribuoj de unuopa kontribuinto estus aŭtomate taksata uzante la matematikan metodon de rekursia fakto-trovado, kiun mi priskribis en mia artikolo *Ĉu tamen eblas pri-Esperanta lingvoscienco?* aperinta en *Lingva Kritiko*.

Scienc-praktikaj studoj pri Esperanto en Ukrainio

Nina DANILJUK

Ukraina/Ukrainujo/Ukraine, Східноєвропейський національний університет імені Лесі Українки
(Wschodnioeuropejski Uniwersytet Narodowy im. Łesi Ukrainki / Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato / Lesya Ukrainka Eastern European National University)

La prelego temas pri la specialaj kursoj pri interlingvistiko kaj Esperanto, kiujn partoprenas la studentoj de Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato en urbo Lucjk (Ukrainio), pri scienc-praktikaj konferencoj kaj rondaj tabloj, kiuj okazis dum la lastaj 10 jaroj, kie temis pri diversaj

projektoj de planitaj lingvoj, pri interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj, pri nuntempa disvolviĝo de Esperanto, pri la centro de Esperanto, kiu funkcias en la universitato, pri tradukoj de la ukraina klasika literaturo al Esperanto.

The practical academic study of Esperanto in Ukraine

The presentation will describe a number of topics related to the study of Esperanto in Ukraine including special courses on interlinguistics and Esperanto for students of the Lesya Ukrainka Eastern European National University in Volyn in the city Lutsk (Ukraine). In addition, practical academic conferences and roundtables which have occurred over the last 10 years concerning various planned language projects, the integration of ethnic and planned languages, the current development of Esperanto, the Esperanto center which functions in the university and the translation of classics of Ukrainian literature into Esperanto will be discussed.

Komunumo kaj Movado

Johan DERKS

Serbia/Serbujo/Serbia, Interlingvistikaj Studoj UAM

Johan Derks donas skizon de la evoluo de la rolo de la instruisto en perinterreta instruado. Grava paŝo estis en 2003 la publikigo de eksperimentoj en Sud-Afriko pri Amasa Malferma Perreta Lernado (AMPLo, en la angla MOOC). Ĝi aplikigas en du formoj, sen aŭ kun interago kun la hejme rigardantaj studentoj, tiel nomata konektiveco. La rolo de la instruisto en tiu rekuplado al la malĉeestaj studentoj havas grandan influon al la rezulto de la lernado. La konektitaj studentoj formigas diskursa komunumo.

Kun tio la preleganto kontrastas la mankon de komunumeco inter membroj de esperantaj dissendolistoj, interalie ilustritan per la granda proporcio de ne-kontribuantoj al la diskuto. Dissendolistoj ne kreas komunumojn sen aktiva rolo de posedanto kaj moderigantoj. Ankaŭ tion atestas la mallonga vivodaŭro de esperantaj dissendolistoj. 39% de la jahugrupoj ne travivas sep jarojn.

Li demandas sin, ĉu tiun situacion ŝuldas la absoluta potenco de posedantoj de retdiskutlistoj, kiuj libere decidas, kiuj rajtas esti membro kaj kiuj ne. Multaj membroj ne scias, kiu estas la posedanto kaj pluraj membroj ŝatas kaŝi sin malantaŭ kaŝnomoj. Ĉu regas la tiel nomata "spiralo de silento"?

Sed ne ekzistas nur granda distanco inter "autoritatuloj" en dissendolistoj kaj ordinaraj membroj, sed ankaŭ inter elito en la Komitato kaj silentemaj komitatanoj. 15 komitatanoj tenas sian postenon jam pli ol dek jarojn, Tial reorganizo de UEA estas ekstrema malfacila tasko.

Alia konsekvenco estas, ke novaj esperantistoj malfacile povas esti integritaj en la organizaĵo. Ne ekzistas komunumo kaj movado en la normala signifo.

Kian fonologion disponis Zamenhof?

Nicolau DOLS SALAS

Hiszpania/Hispanio/Spain, Universitat de les Illes Balears, Institut d'Estudis Catalans

En longa Lingva respondo de 1891 pri akcento, Zamenhof plendas pri trouzado de teorio en kritikoj de Esperanto. La temo estas interesa ĉar montras klaran preferon de Zamenhof por praktikaj solvoj kaj iaspecan malfidon pri teoria helpo. Krom tio, skribado kiel la unua formo de Esperanto estas ankaŭ substrekita de li mem kiel kialo de fiksita vortakcento. Mi intencas formuli tri demandojn en ĉi tia esplorkampo: (1) Kia fonologio ekzistis en la tempo kiam Zamenhof planis Esperanton?, (2) Kiel tipologie kongruas la decido pri akcento en Esperanto?, kaj (3) Kiujn praktikajn konsekvencojn havas en nuntempa elparolado tiu decido? Pro tio mi kombinos historion de lingvistiko, lingvokomparadon kaj fonetikan analizon de reala prononcado. En la tria Interlingvistika Simpozio (2014) mi analizis konsekvencojn de regulo 9 de la Fundamenta Gramatiko, nun mi proponas daŭrigi la studadon de la Zamenhofa fonologio per analizo de regulo 10, pri akcento.

Esperanto and the market state

Michael FARRIS

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza

The nation state is a form of government that merges a dominant ethnic or culture group with a political entity on a shared territory. It dates from the 17th and 18th centuries and it was the dominant state form in the 19th and 20th centuries. In this model, government legitimacy stems from providing services (such as education, infrastructure and social programs) to the citizenry. Esperanto is a product of the nation state period and much of the symbolism and structure of the Esperanto movement is tied to nation state ideas. At present however, according to many social and political analysts, this form of state organization is now in decline and a new state form, often referred to as the market state, is emerging. In the market state the relationship between citizens and governments, as well governments with each other, undergo profound, far reaching changes. This paper will examine opportunities and obstacles that this new state form has for the Esperanto movement.

Esperanto kaj la Merkata Ŝtato

La nacia ŝtato estas formo de registaro, kiu kunigas ĉefan etnan, lingvan aŭ kulturan grupon en komuna teritorio. Ĝi devenas de la 17a kaj 18a jarcentoj kaj estas la reganta ŝtatformo en la 19a kaj 20a jarcentoj. Laŭ tiu modelo, la legitimeco de la estraro devenas de la provizo de servoj (kiel edukado, infrastrukturo kaj sociaj programoj) al la civitanaro. Esperanto estas produkto de la nacia ŝtata periodo kaj multe da la simboleco kaj strukturo de la Esperanto movado devenas de la nacia ŝtato idearo. Nuntempe tamen, laŭ multaj sociaj kaj politikaj analizistoj ĉi tiu formo de ŝtatorganizo komencis malaperi kaj nova ŝtatformo, ofte nomigata la merkata ŝtato komencas antŝtataŭigi ĝin. En la merkata ŝtato la rilatoj inter civitano kaj registaro (kaj inter registaroj) spertas profundajn kaj vastajn ŝanĝojn. Ĉi tiu prelego esploros ŝancojn kaj obstaklojn kiujn la Esperanto movado alfrontos en la merkata ŝtato.

Esperanto i Państwo Rynkowe

Państwo Narodowe jest modelem rządu skupiającym główne grupy etniczne, językowe bądź kulturowe na wspólnym terytorium. Jego początki pochodzą z XVII i XVIII wieku i było najpowszechniejszym modelem Państwa w XIX i XX wieku. W tym modelu uzasadnienie dla rządu wynika z dostarczania usług obywatelom (np. edukacja, infrastruktura, zabezpieczenie społeczne). Esperanto jest produktem ery Państwa Narodowego i wiele symboli i struktur ruchu esperanckiego związanych jest z ideami Państwa Narodowego. Obecnie natomiast według wielu analityków i publicystów, ten model organizacji Państwa chyli się ku upadkowi, a wyłania się nowy model Państwa, często określany jako Państwo Rynkowe. W Państwie Rynkowym relacje między obywatelem i rządem, tak jak między samymi rządami, ulegają daleko idącym przemianom. Ten referat omówi możliwości i przeszkody dla ruchu esperanckiego wynikające z tego nowego modelu Państwa.

Esperanto – ĉu lingvo por ludado kaj ŝercado?

Sabine FIEDLER

Niemcy/Germanio/Germany, Universität Leipzig

Kiam ni aŭdas pri planlingvo – lingva sistemo, konscie kreita por faciligi internacian komunikadon – humuro kaj lingvoludado certe ne estas la unuaj funkcioj, pri kiuj ni pensas. Tamen, se planlingvo volas esti plene funkcia ilo de komunikado, ĝi devas plenumi ĉiujn komunikajn celojn de parolantoj. Kaj, se temas pri Esperanto, kaj niaj praktikaj spertoj kaj sciencaj studoj (ekz. Jordan 1988, Fiedler 2001, Melnikov 2008) montras, ke tio ĝustas. Esperanto ne nur lingve taŭgas multteknike produkti humuraĵojn, ŝerca komunikado eĉ ŝajnas esti karakterizaĵo de lingvouzo en la Esperanto-komunumo. La prelego konsistas el du partoj: La unua parto analizas kaj piskribas ĉefajn tipojn de lingvoludado en Esperanto (kiel ekz. ludado per propraj nomoj, mallongigoj, frazeologiaj esprimoj kaj kvazaŭ-homonimoj). Montriĝas, ke ni trovas ekzemplojn sur ĉiuj ebenoj de la lingva sistemo. Samtempe evidentiĝas, ke Esperanto ankaŭ ĉirilate havas kaj multajn similaĵojn al aliaj lingvoj kaj kulturajn specifiaĵojn. La dua parto okupiĝas pri la rolo de humuro en Esperanto-komunikado. Kiujn funkciojn ĝi plenumas? Ĉu ĝi estas ĉiam subtena kaj kooperativa? Ĉu estas humorstrategioj, kiujn Esperanto-parolantoj preferas? Ambaŭ partoj baziĝas sur realaj ekzemploj el skribaj kaj parolaj komunikeventoj. Akompanas ilin enkonduko al ĉefaj teorioj de humoresplorado.

Fiedler, Sabine (2001): "Die B/blanken Wissenschaft" – Luda komunikado en Esperanto. En: Sabine Fiedler/Liu Haitao (Red.): *Studoj pri Interlingvistiko*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 585-602.

Jordan, David K. (1988): Esperanto: the international language of humor; or, What's funny about Esperanto? *Humor* 1-2(1988), 143-157.

Melnikov, Aleksandro S. (2008): *Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto*. San-Marino/Moskvo/Rostov-na-Donu.

Take My Word for It

Richard FORSYTH

Wielka Brytania/Britujo/UK

This paper outlines a computer-assisted methodology to help surmount one of the barriers to the adoption of an international auxiliary language and thus get closer to Zamenhof's dream -- a concise, workable vocabulary for international intercommunication.

1. Identify a list of essential semantic units (LESU).
2. Find translation equivalents in a number of existing languages for these items.
3. For each item find the most 'typical' among the alternatives according to an objective score.
4. Optimize its 'typicality' by systematic character-based manipulations.

Much spadework has been done already to codify the LESU. I know of six serious attempts at this task (Ogden, 1937; Eaton, 1940; Hogben, 1963; Macmillan, 2002; Longman, 2003; Nerrière & Hon, 2009) from which a consensus can be obtained by picking terms that occur in two or three lists.

The novelty is a simple procedure for 'averaging' words. Once we have our LESU -- in English just as an example -- we obtain translations in a number of other languages. The next step uses a textual similarity score to pick, for each item, a 'verbal median'. For example, applying this procedure to the word for 'young' in five Romance languages, plus Latin,

['jeune', 'joven', 'giovane', 'jovem', 'tinar', 'iuventus']

we find that

'joven'

is the most 'typical', according to this scoring system. Here the Spanish word is the 'verbal average'. Then a small-scale search is performed on each 'average' term to see if small mutations increase the similarity score. If so, the modified version is kept, otherwise the original item, and this becomes our international root. In the example above, this procedure alters 'joven' to 'jove' which illustrates that the result doesn't have to be present already in one of the source languages. (It occurs in Catalan.)

For the first time in interlinguistics the choice of vocabulary items can be based on repeatable criteria rather than subjective judgement. I have implemented one scoring system in Python3. I do not insist that it is the best that could be done, which is why the program is made public for potential improvements.

Eaton, H.S. (1940). *An English French German Spanish Word Frequency Dictionary*. New York: Dover Publications [1961].

Hogben, L. (1963). *Essential World English*. London: Michael Joseph Ltd.

Longman (2003). *Dictionary of Contemporary English*. Harlow: Pearson Educational Ltd.

Macmillan (2002). *MacMillan English Dictionary for Advanced Learners*. Oxford: MacMillan Education.

Nerrière, J.-P. & Hon, D. (2009). *Globish the World Over*. International Globish Institute.

Ogden, C.K. (1937). *The ABC of Basic English*. London: Kegan, Paul, Trench, Trubner & Co. Ltd.

Prenu mian vorton

Tiu ĉi artikoleto skizas metodon perkomputilan por helpi superiri unu el la baroj al la akcepto de internacia helplingvo, kaj tiel proksimiĝi al la revo de Zamenhof -- koncizan uzeblan vortaron por internacia interkomunikado. La metodo de "Lingloss":

1. Establi liston de necesaj signiferoj (signifer-aron).
2. Trovi tradukekvivalentojn de ili en kelkaj ekzistantaj lingvoj.
3. Por ĉiuj eroj trovi la plej tipan inter la alternativoj laŭ objektiva mezuro.
4. Plitaŭgigi ties 'tipecon' per sistemaj karaktromanipuloj.

Rilate al tio, multa laboro jam estas farita por kodigi la signifaron. Mi konas ses seriozajn klopodojn je tiu tasko (Ogden, 1937; Eaton, 1940; Hogben, 1963; Macmillan, 2002; Longman, 2003; Nerrière & Hon, 2009) de kiu oni povas atingi ĝeneralan konsenton per elekti terminojn, kiujn okazas en du aŭ tri el ses listoj.

La noveco estas simpla proceduro por 'averaĝigi' vortojn. Kiam ni havas nian signifaron -- en la angla, ekzemple -- ni akiras tradukojn en pluraj aliaj lingvoj. La sekva paŝo uzas mezuron de teksta simileco por elekti, por ĉiu ero, 'vortan mezumon'. Ekzemple, aplikante ĉi tiun proceduron al la vortoj por 'juna' en kvin latinidaj lingvoj kaj la latina,

['jeune', 'joven', 'giovane', 'jovem', 'tinar', 'iuventus']

ni trovas ke

'joven'

estas la plej 'tipa', laŭ ĉi tiu pritaksa sistemo. Ĉitiuokaze la hispana vorto estas la 'vorta mezumo'. Poste serĉeto estas farata pri ĉiu 'averaĝa' termino por vidi ĉu malgrandaj mutacioj pliigas la gradon de simileco. Se jes, la modifita versio estas konservita, alie la originala termino, kaj tio fariĝas nia internacia radiko. En la supra ekzemplo ĉi tiu proceduro ŝanĝas 'joven' al 'jove', kio ilustras, ke la rezulto ne necesas ekzisti jam en unu el la fontaj lingvoj. (Ĝi tamen ekzistas en la kataluna.)

Tiel, unuafoje en interlingvistiko, la elekto de vortareroj povas baziĝi sur refareblaj kriterioj anstataŭ subjektiva juĝo. Mi jam efikigis unu poentkalkulan sistemon en Python3. Mi ne insistas, ke ĝi estas la plej bona kion oni povas fari, tial la programo publikiĝos por ebligi plibonigojn.

Eaton, H.S. (1940). *An English French German Spanish Word Frequency Dictionary*. New York: Dover Publications [1961].

Hogben, L. (1963). *Essential World English*. London: Michael Joseph Ltd.

Longman (2003). *Dictionary of Contemporary English*. Harlow: Pearson Educational Ltd.

Macmillan (2002). *MacMillan English Dictionary for Advanced Learners*. Oxford: MacMillan Education.

Nerrière, J.-P. & Hon, D. (2009). *Globish the World Over*. International Globish Institute.

Ogden, C.K. (1937). *The ABC of Basic English*. London: Kegan, Paul, Trench, Trubner & Co. Ltd.

Toward an Intercultural Linguistic Repertoire

Agnes He

USA/Usono/USA, Stony Brook University

Given that today's world is increasingly globally linked and technologically interconnected, that the mingling and melding of human cultures has become the preeminent conditions of the 21st century, that our families, communities and workplaces are increasingly globally constituted and globally oriented, and that we are increasingly being shaped and contoured by both the strengths and stresses that accompany cultural contact, conflict, and convergence, I argue that what we need at this point in history is not some 'international language', but rather an intercultural linguistic repertoire.

Grounded in applied linguistics, I suggest that globalization calls for speakers who are able to negotiate in a variety of contexts without being encapsulated by or alienated from any given culture, ready to choose and pick their own make-up from a repertoire of resources and strategies that they draw upon depending on the context of situation -- audience, purpose, goal, setting, modality, etc. (Cook 1995, 2006; He, 2013; Kramsch, 2010), and eager to explore problems that transcend generations and geographies (He 2006, 2011). Global citizens break perceptible linguistic boundaries and traverse invisible cultural and identity borders, as evident in the practices of codeswitching (Gumperz, 1982), code-mixing (Sridhar & Sridhar, 1980), codemeshing (Canagarajah, 2011), plurilingualism (Council of Europe, 2001), metrolingualism (Pennycook, 2010), poly-lingual languaging (Jorgenson, 2008), and performative translanguaging (Li, 2011; Garcia & Li, 2014).

An intercultural linguistic repertoire approach enables us to view multilingual speaker behavior as a complex system that is self-organizing, emergent, creative and unpredictable, but bounded by the entire linguistic repertoire of the speaker. It is a collage and calibration of holistic resources (phonemic, morpho-phonemic, syntactic, prosodic, episodic, sequential) from the entire linguistic repertoire simultaneously accessible to speakers engaged in intercultural encounters. I will draw illustrative data from native Chinese speakers in American diaspora.

Polityka wielojęzyczności w Hiszpanii

Maciej JASKOT

Polska/Pollando/Poland, SWPS Uniwersytet Humanistycznospołeczny

Hiszpania zawsze była krajem wielojęzycznym. Obecnie na terytorium Królestwa Hiszpanii używa się ponad setki języków, w związku ze wzmożoną imigracją. Wszakże od początku swojego istnienia Hiszpania była areną wielojęzyczności. Dziś, gdy około połowa mieszkańców Hiszpanii zamieszkuje obszary dwu- lub wielojęzyczne, sytuacja wielojęzyczności Hiszpanii odzwierciedlona jest w stosownych aktach prawnych oraz w samej konstytucji królestwa. Rządy regionów autonomicznych, w których mówi się innym językiem niż kastylijski, prowadzą zakrojone na szeroką skalę programy mające na celu zapewnić obecność języka regionalnego w życiu mieszkańców. Rzeczywistość wielojęzycznego społeczeństwa ujęta jest w systemie prawnym oraz odzwierciedla się we wszystkich sferach życia społecznego. Proces rewindykacji języków regionalnych na półwyspie jest też często związany z postulatami niezawisłości regionów

(np. w Katalonii lub w Kraju Basków). Koncepcja wielojęzyczności staje się zatem zakładniczką samej siebie i wydaje się podminowywać odgórną zasadę pluralizmu. Czy model hiszpański jest skuteczny i jakie stoją za nim przesłania?

The Emergence of Cyber Lingua Franca in the Digital Age: A Hope for Linguistic Equality of the World

KATADA Fusa / 片田 房

Japonia/Japanujo/Japan, 早稲田大学 (Uniwersytet Waseda / Waseda Universitato / Waseda University)

The current wave of globalization aided by ubiquitous computing and the worldwide literacy diffusion necessarily involves communication-driven interaction and integration among people and human institutions worldwide, as if they were living in one world communicating through a common linguistic form. Professionals in science and technology, in particular, are expected to have effective communication skills, especially using English as a global lingua franca (EGLF). Under such circumstances, two issues are raised: (1) linguistic diversity surrounding EGLF, from which linguistic divide arises against the non-native English world, and (2) a notably increasing population with communication disorders (WHO, 2007), which yields an ironical gap between the communicative demand and the general communication vulnerability of those expected to be effective global communicators. The confusion of language (in science and technology) is, so to speak, a modern-day Tower of Babel, always leaving a linguistic disparity.

We nonetheless have a hope toward linguistic equality, an optimistic horizon set by computer engineers nearly 20 decades ago. The availability of 'cyber lingua franca' (CLF) as a product of the globalized ubiquitous computing is rapidly underway now, which functions as a mediator (translator and interpreter) between any language pairs. CLF, not EGLF, realizes what I term 'autolingualism' which would be a possible solution for the aforementioned two issues. Given such a technological reality, we may realize the importance of the solid knowledge of one's own language and promote the notion of inclusion of different people and cultures with linguistic justice and equality. Cyber lingua franca is a new form in the digital age that would succeed L.L. Zamenhof's philosophy encapsulated in his invention Esperanto.

Polskie podręczniki do nauki języka volapük z lat 1888-1889 jako teksty propagujące ideę języka międzynarodowego

Irmina KOTLARSKA

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet Zielonogórska

Celem wystąpienia będzie zaprezentowanie polskich podręczników do nauki języka volapük wydanych w latach 80. i 90. XIX jako tekstów pełniących dwojaką funkcję: dydaktyczną oraz perswazyjną. Językoznawczemu oglądowi poddane zostaną następujące podręczniki: Szymona Trusza *J.M. Schleyer: Mowa światowa „Volapük”: gramatyka*, Złoczów 1888; Samuela Kornmana, *Volapuk: kilka uwag o nowym języku światowym*, Lwów 1888, broszura zatytułowana *Volapük czyli język międzynarodowy wyłożony w ośmiu lekcjach do użytku kupców w kantorach, podróżnych w*

hotelach itp., Warszawa 1888; Edwarda Nawrockiego *Najkrótsza i najlepsza nauka obcych języków w 10 lekcjach a obejmująca języki światowe: Volapük, angielski, francuski i niemiecki [...]: dziełko to przeznaczone dla inteligencji. z. 1*, Przemyśl 1889. Autorzy tych podręczników byli przekonani o konieczności popularyzacji języka volapük na ziemiach polskich, a przekonanie to oparli na oparli na argumentach, które legły u podstaw ruchu volaküistów. Chęć pozyskania zwolenników dla idei używania międzynarodowego języka pomocniczego wpłynęła na kształt stylowo-językowy podręczników będących przedmiotem obserwacji. W wystąpieniu zaprezentowane zostaną językowe środki służące przekazywaniu wiedzy o nowym języku (funkcja dydaktyczna) oraz te, które miały przekonać Polaków do konieczności uczenia się języka międzynarodowego (funkcja perswazyjna). Metodologicznie wystąpienie mieści się w obszarze pragmatycznie zorientowanej lingwistyki diachronicznej, wspomagająco wykorzystane będą narzędzia wypracowane przez stylistykę oraz genologię lingwistyczną.

20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj en UAM

Ilona KOUTNY

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza

Post la graveco kaj loko de esperantologio kaj interlingvistiko en universitato la aŭtoro skizas la historion de la Esperanto-fako de ELTE (Budapeŝto), kiu estis fondita kiel la unua en sia tipo antaŭ 50 jaroj. Sekvas la 20-jara historio de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de UAM (Poznano) kiuj estas internaciaj se rigardi kaj la studentojn kaj instruistojn. La studprogramo disponigas lingvistikajn kaj komunikajn bazojn por la studado de internaciaj lingvoj kaj speciale okupiĝas pri la lingvistiko kaj kulturo de esperanto. Temos ankaŭ pri la aldonaj eblecoj de universitata fako (esplorado, doktorigo, kunlaboro kun aliaj universitatoj, eldonaĵoj).

20 years of Interlinguistic Studies at UAM

After treating the importance and place of Esperanto and interlinguistic studies at universities the author outlines the history of Esperanto studies at ELTE (Budapest) founded 50 years ago as the first of its kind. As a next step, the postgraduate Interlinguistic Studies (Poznan) are presented with its 20 years of history, with international students and teachers. The study program gives the linguistic and communicational bases for the investigation of international languages, it deals especially with linguistic and culture of Esperanto. Some additional possibilities will be mentioned (research, doctoral studies, collaboration with other universities, publications).

Historio de la KER-ekzamenoj

Katalin KovÁTS

Holandia/Nederlando/the Netherlands, Edukado.net

La Esperanto-ekzamensistemo de UEA-ORIGO, ellaborita laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) estis lanĉita en la lastaj tagoj de 2008. Ekde tiam pasis 9 jaroj, estis organizitaj sesioj en 87 lokoj de 30 landoj. Sukcese trapasis la ekzamenojn pli ol 2000 personoj el 70 landoj.

Katalin Kovats, la ĉeforganizinto de la KER-ekzamenoj kaj gvidinto de la ekzamena komisiono de UEA pli ol 10 jarojn laboris por diskonigi kaj funkciigi la ekzamensistemon por kio ŝi uzis la memplanitan retejan modulon kaj procedurojn en la paĝaro edukado.net. En la prelego ŝi prezentos faktojn, malkaŝos multajn sekretojn, malfacilaĵojn kaj kelkfoje amuzajn flankojn de tiu laboro. La publiko ekkonos ankaŭ ĝis nun nepublikajn planojn pri la estonto de la KER-ekzamenoj.

Komparo de la amhara kaj esperanta vortfaradoj

Michał Kozicki

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza

Sub la termino *vortfarado* oni komprenas la kreadon de novaj lingvistikaj unuoj en la lingvo. Ĉar la amhara kaj esperanto apartenas al diversaj morfologiaj kriterioj, la komparado de la strukturo de neologismoj ne ĉiam estas facila. La amhara estas tipa fleksia lingvo, kie ankaŭ gravas la alternado de vokaloj, dum Esperanto estas alglua lingvo, kie ĉiu morfemo havas alian funkcion. Malgraŭ la tipologiaj problemoj, en ambaŭ lingvoj oni povas observi la uzadon de apartaj prefiksoj kaj sufiksoj, kiuj modifas la signifon de la vorto, la saman koncepton de kunmetado, kvankam ĝi estas esprimita diversmaniere, la pruntadon de vortoj el diversaj lingvoj kune kun la traduko de kalkeoj. Ambaŭ lingvoj ĉerpas de la heredaĵo de klasikaj lingvoj – la geeza por la amhara kaj la latina por Esperanto – se temas pri la kreado de faka terminologio. Tamen la morfologiaj kaj strukturaj diferencoj inter la amhara kaj la esperanta estas sufiĉe grandaj. En la amhara kaj geeza lingvo ekzistas multe da triradikaj vortoj, kies internaj strukturoj povas esti ŝanĝitaj per la alternado de vokaloj por aldoni novajn signifojn, kio ne estas ebla en la eŭropdevenaj radikoj de esperanto. Eĉ se nur de nemultaj eŭropaj vortoj eblas kvazaŭ perforte fari la radikojn por krei vortfamiliojn en la semida maniero, la ekscesa pruntado de fakvortoj de la angla estas senfrukta en la amhara. Tiun ĉi problemon oni ofte solvas en Etiopio per la metaforigo de nocioj, ekzemple la *fervoja motoro* por 'lokomotivo'.

Kial la hispana neniam rolis kiel interlingvo en Filipinaj Insuloj

Félix Manuel Jiménez LOBO

Hispania/Hispanujo/Spain, Interlingvistikaj Studoj UAM

Malsame ol tio, kio okazis en la amerikaj ekskolonioj de Hispanio, en Filipinaj Insuloj la hispana lingvo nek estas nek iam estis vaste parolata. La amerikaj landoj atingis ties sendependencon je la komenco de la XIXa jarcento, sed la Filipinoj ankoraŭ apartenis al Hispanio ĝis 1898, kiam dum la hispana-usona milito Usono konkeris la insulojn kaj do la vera sendependeco alvenis en 1946, post

la dua mondmilito. Tradicie oni diras, ke la kialo de la preskaŭ neekzisto de la hispana en la nuna Filipinoj estis la forta premo de la usona kulturo, ĉar la nova registaro ekde 1898 enkondukis la devigon de la edukado en la angla kaj malpermesis la uzadon de la hispana, sed tio ja ankaŭ okazis en alia insulo, Porto-Riko, ĉi-kaze en la Kariba maro kaj ankaŭ perdita de Hispanio dum la sama supre menciita milito kaj eĉ hodiaŭ ankoraŭ dependanta de Usono, kie la denaska lingvo de ĉiu portorikano estas la hispana. Do, por serĉi la kialon ni devas rigardi plu antaŭe, dum la 300-jara regado de Hispanio en la Insuloj, kiam io okazis (aŭ ne okazis), kio faris, ke hodiaŭ la hispana estu simpla anekdoto en tiu azia lando.

Wymóg znajomości języka oficjalnego jako warunek uzyskania obywatelstwa w wybranych krajach europejskich w świetle obowiązujących przepisów – studium porównawcze

Katarzyna KUBASZCZYK

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza

Przedmiotem analizy są uwarunkowania prawne, w kontekście ochrony dziedzictwa językowego i wspólnoty językowej w wybranych krajach europejskich, w których jednym z języków oficjalnych jest język francuski. Studium porównawcze ma na celu odpowiedź na pytanie, czy wobec osób starających się o obywatelstwo bądź naturalizację istnieje wymaganie znajomości języka kraju nadającego prawa, oraz kogo i w jakim zakresie zobowiązanie dotyczy.

Requirement of knowledge of the official language as a condition of obtaining citizenship in selected European countries in the light of the applicable legislation – comparative study

The subject of the study is the legal environment in the context of the protection of the linguistic heritage and linguistic communities in selected European countries where one of the official languages is French. The comparative study aims to answer the question of whether there is a requirement for citizenship or naturalization to know the language of the country granting rights and to whom and to what extent the obligation applies.

The effects of the language policy in China

Maria KURPASKA

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet im. A. Mickiewicza

The population of China consists of 56 officially recognised ethnic groups, which speak (depending on the criteria) from 130 to nearly 300 languages. About 90% of the population declare themselves as belonging to the Han-Chinese nationality. The language spoken by this majority is by no means uniform, the varieties of Chinese are so diversified, that most of them are mutually

unintelligible, and some western linguists even call them separate languages. The remaining 10% speak languages classified into five language families.

Is it possible to introduce one common language in a country with the largest population on Earth? China has been carrying out its language policy since the 1950'. The goal is to spread the national standard – Mandarin, or *Putonghua*, all over the country, so that all inhabitants could communicate freely. This idealistic work is already very advanced and it causes vast changes in the linguistic landscape of China.

Not all the rights of minority languages declared in the constitution are respected. Also the non-Mandarin varieties of Chinese are subject to unification and noticeable changes are ongoing in the local tongues. This paper is going to show the various aspects of Chinese language policy, the positive and negative effects it has on the languages in China.

Baldur Ragnarsson kaj Edwin de Kock - elstaraj nuntempaj esperantaj poetoj

Lidia LIĜEZA

Polska/Pollando/Poland

Du moderne verkantaj poetoj forte influis je disvolviĝo de la esperanta lingvo kaj esperanta poezio. Jen ili laŭ kelkaj ecoj de ilia poezia mondo.

Baldur Ragnarsson :

1. poezia interkompreno kun la aŭtoro apogita je la subkonscio
2. pesimismo
3. morna bildo de la mondo
4. aplikado de tre kurtaj versoj
5. valoraj kunmetaĵoj

Edwin de Kock:

1. kontraŭtradiciaj provoj apliki poeziajn rimedojn
2. konsideroj pri kvin elementoj: akvo, aero, tero, fajro kaj tempo, kiuj realiĝas kiel moralaj kaj filozofiaj nocioj - amo, vivo, kruelo kaj morto
3. meditado pri la vivo kaj pri la propra memo
4. freŝaj kaj trafaj metaforoj

Oni povas konstati, ke pravis J. Régulo Peréz skribante, ke: “La artforto kuŝas ne en sia kompreneblo aŭ klasigeblo laŭ la kanonaj principoj, sed ja en sia infektokapablo, en sia kontaĝeco”.

Lingva subpremado kaj nuntempa akademio

Vicente MANZANO-ARRONDO

Hiszpania/Hispanujo/Spain, Universidad de Sevilla

Subpremado estas vorto ofte uzata, kvankam malofte pripensata. Oni kutime uzas ĉitium vorton kiam iamaniere oni deziras montri maljustecojn, kiuj okazas al grupo da homoj. Tiuj homoj ne povas atingi gravajn celojn (kiuj permesus sati gravajn bezonojn) pro diversaj sociaj kialoj. La aŭtoroj, kiuj skribas pri la afero, kutime uzas la vorton, sed ne priskribas ĝian signifon. Aliflanke, la publikaĵoj pri lingva justeco ankaŭ temas pri maljusteco, rilate al minoritatoj kaj pri iliaj lingvaj rajtoj. Kiam aperas la homaj bezonoj ĉe tiu punkto, ili havas la rolon subteni la diskurson pri la rajtoj.

Ĉi tiu kontribuo klopodas unuigi ambaŭ flankojn. Ĝi temas pri lingva subpremado. Pro tio, ni komencos priskribante la subpremadon per la uzo de du kolonoj: povo kaj bezono. Tio permesos al ni pensi ne nur pri la sociaj muroj, kiuj leviĝas inter la homoj kaj la celoj, sed ankaŭ pri la celoj mem, kaj pri ilia kapablo sati bezonojn. Danke al tiu okulvitro oni povas rimarki, ke la problemoj pri la malekvilibro inter la lingvoj ne nur kuŝas en la socia sistema funkciado, kiu konstruas malpovon, sed ankaŭ en la socia sistema funkciado, kiu konstruas celojn kaj aranĝas bezonojn. Por liberigi, oni devas montri (kaj prilabori) ankaŭ tiun duan parton de la problemoj.

La kontribuo fokusiĝas pri la universitata mondo. Pro tio oni devus rapide kompreni, kiel nuntempe funkcias la tutmondigita universitato. Tiel, ni parolos pri kiel la akademia lingva subpremado nutriĝas kune kun la maniero taksati la scian laboron, ĉe la merkato de la sciencaj publikigaĵoj. Fine, oni povas kompreni, kial la universitato estas enloĝata de homoj, kiuj enhavas evoluantan cerbon, sed amasigas stultan kolektivan konduton.

Se la tempo permesos, ni povos eniri unu el la eblaj strategioj, kiu estas elpensita de loka universitata grupo en la hispana urbo Sevilo.

Esperantistaro – kia sociumo?

Aleksander MIELNIKOW

Rosja/Rusujo/Russia

Estas skizitaj la ĉefaj kriterioj por disklasifiki la esperantistaron je apartaj grupoj kaj donita difino de tipa E-kulturano (TEK). Plue estas konsiderataj ĉefe aŭ nur TEK-oj. Estas komparataj la plej esencaj karakterizaĵoj de socia grupo, malgranda grupo, lingva kaj/aŭ kultura diasporo, minoritato kaj esperantistaro. Estas konstatite, ke la TEkaro (jen ĝia parto, jen la tuto) povas esti konsiderata reprezentanto de ajna el la listigitaj sociumoj.

Apartan atenton meritas komparo inter etno kaj la TEkaro. La ĉefaj distingiloj de etno estas memkonscio, lingvo kaj kulturo. Se pri la unuaj du indikiloj de TEkaro duboj ne ekzistas, la tria (kulturo) elvokas diskutojn.

Ni bazas nin sur la difino, laŭ kiu kulturo estas negenetika memoro de sociumo kaj inkludas ĉion homkreitan: artefaktojn, spiritaĵojn (scioj, ideoj, moralo, arto ktp.) kaj konduk-regulojn. „Specifa E-kulturo“ ni nomas ĉion, kio rilatas al kulturo ĝenerale sed kio troveblas nur en la E-movado aŭ estas malmalĝena (kvante aŭ kvalite) ĉefe en ĝi. Pluraj esploroj montras, ke la TEkaro (sendepende de la nacieco) havas specifajn artefaktojn kaj fonajn sciojn (kun ties markiloj – esperantonimoj),

kiuj lastaj, cetere, laŭ sia temaro tre similas al fonaj scioj de etnanoj. Troveblas komunaj ideoj / valoroj kaj kondut-stereotipoj. Ekzistas eĉ psikologiaj-personecaj specifajoj de TEk kaj iugrada endogamieco. Ĉio ĉi, malgraŭ certaj diferencoj, ebligas al ni etikedi la TEkaron kvazaŭetno.

La Freinet-pedagogio, teorie kaj praktike

Monika MOLNÁR

Szwajcaria/Svislando/Switzerland, Ecole de La Grande Ourse

Pedagogio, edukado, lernejo, lernejoj kun siaj avantaĝoj kaj/aŭ la maloj... Jen ĉiam aktualaj temoj en la homa socio. Foje ni aŭdas pri pozitivaĵoj koncerne la instru-sistemon, sed averaĝe pli multas kritikoj... La temo ĉiam aktualas, ja temas pri la preparo de la futura generacio, kiu prenos nian lokon. Kiajn posteulojn ni ŝatus havi post ni?

La tasko de la lernejo devus esti akompani la infanojn al la malkovro de siaj "geniecoj" kaj prepari ilin al la vivo. Kion oni povus fari por plibonigi la kondiĉojn de la gelernantoj, por atingi, ke la scio-akiro estu vola, volonta kaj ne deviga afero, ke la lernitaĵoj havu sencon? Ĉu oni vere devas ĉiam elpensi ion novan aŭ sufiĉus preni iun ekzemplon, kiu funkcias kaj unue analizi, kompari, kompreni la kialojn, due vidi kiel ili aplikeblas surloke?

Dum la historio ekzistis pluraj sekvindaj pedagogoj, kiuj alportis ion al la civilizacio, sed pri kiuj oni pli-malpli forgesis en la granda serĉado de novaj metodoj. Unu el ili estis Célestin Freinet.

Célestin Freinet estis franca pedagogo, kiu kreis sian pedagogion ne ĉar ne ekzistis alia, sed ĉar li troviĝis en specialaj kondiĉoj. Unu el liaj ĉefaj celoj estis, ke la gelernantoj estu aktivaj aktoroj de siaj lernadoj. Por tio bezonatas redoni la plezuron de la laboro, doni sencon al la scioj. Fama frazo de Freinet - konata jam de Konfuceo: "Mi aŭdas kaj mi forgesas. - Mi vidas kaj mi rememoras. - Mi faras kaj mi komprenas".

Tamen, kiel li ligiĝas al Esperanto? Multaj forgesas aŭ eĉ ne scias, tamen jes, li uzis Esperanton en sia klaso. Konvinkiĝinte pri ĝiaj avantaĝoj, li korespondigis siajn gelernantojn por malkovrigi al ili la mondon. Inter la ĉefaj celoj de Freinet - simile al Zamenhof - estis la transdono de toleremo, respekto, dialogo, kunlaboro. Li volis, ke la infanoj rimarku, kiumaniere kun alilandaj infanoj ili estas samtempe similaj kaj tamen tute diversaj.

Apud la mortodatreveno de Zamenhof, baldaŭ 100-jariĝos ankaŭ la Freinet-pedagogio. Ĉu avantaĝo aŭ ne? Ĉu 100-jara pedagogia movado estas nepre malmoderna? Lia pedagogio estas orminejo por tiuj, kiuj kapablas kompreni kaj apliki ĝin! Unu el tiuj lokoj, kie hodiaŭ estas praktikata tiu ĉi pedagogio, estas la lernejo "La Granda Ursino" (*Ecole de La Grande Ourse*) en Svislando. Ni sekvas la spurojn de Freinet daŭre klopodante aŭ inventi, aŭ plibonigi, adapti manierojn je la servo de la gelernantoj, kiel Freinet mem faris tion siatempe. Mi prezentos miajn spertojn en tiu ĉi lernejo.

D-ro Esperanto en Sovietunio: Zamenhof, Marr kaj la (lingva) revolucio

Sébastien MORET

Szwajcaria/Svislando/Switzerland, Université de Lausanne

Pluraj sciencistoj (ekzemple U. Lins aŭ M.I. Isaev) jam notis la fakton, ke Esperanto spertis du malsamajn periodojn dum la unuaj jardekoj de Sovetunio. Post periodo de disvolviĝo kaj relativa plenumo dum la 1920-aj jaroj, la lingvo kreita de Zamenhof estis dum la Stalina tempo unue konsiderata kun suspekto kaj malestimo kaj fine malpermesita. En ĉi tiu prelego mi ŝatus koncentriĝi sur Zamenhof kaj la loko, kiun li okupis en sovetia historiografio. Post rapida kaj ĝenerala superrigardo pri la disvolviĝo de la bildo de Zamenhof depost la Revolucio ĝis la morto de Stalino en 1953, mi parolos pri relative nekonata dueto de la 1920-aj jaroj: Zamenhof kaj Marr. La kreinto de Esperanto kaj la «oficiala» lingvisto de Sovietunio kaj patro de la «Nova teorio pri la lingvo» estis foje konsiderataj kiel la du vizaĝoj de la lingva revolucio, kiu kune kun la politika, kondukos al liberigo de la laboristoj.

Dr Esperanto in the Land of the Soviets: Zamenhof, Marr, and the (Linguistic) Revolution

Several scholars (e.g. U. Lins or M.I. Isaev) have already pointed out the fact that Esperanto experienced two different periods during the first decades of Soviet Union. After a period of development and relative fulfilment during the 1920s, the language created by Zamenhof was, during Stalin's time, first considered with suspicion and contempt, and finally banned. In this paper I would like to focus on Zamenhof and on the place he occupied in Soviet historiography. After a quick and general overview of the evolution of the image of Zamenhof from the Revolution to the death of Stalin in 1953, I will concentrate on a relatively unknown duo of the 1920s: Zamenhof and Marr. The creator of Esperanto and the «official» linguist of USSR and father of the New theory of language were sometimes grouped together and considered as the two faces of a linguistic revolution which, together with the politic one, will lead to the liberation of the workers.

Nordafrika alieco: koloniaj trajtoj en la verkoj de Ribillard kaj Newell

Xesús Muñíos Pardavila

Hiszpania/Hispanujo/Spain, Interlingvistikaj Studoj

L. N. Newell (1902-1968) kaj Jean Ribillard (1904-1962) estis aŭtoroj de prozaj verkoj, kies intrigoj disvolviĝas en norda Afriko dum la kolonia epoko. La unua publikigis *Bakŝiŝ* (1938) kun fono de Egiptujo, kiam ĝi estis brita protektorato, kaj la dua, *Vagado sub palmoj* (1956) kaj *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* (1963), kies rakontoj okazas en la tiama Alĝerio sub franca regado. La analizo traspuras la karakterizojn proprajn al la kolonia literaturo en la menciitaj verkoj, kaj sub la prismo de la postkoloniaj studoj klopodas enkuntekstiigi rolulojn kaj pejzaĝojn markitajn per la signo de alieco.

Nuntempa lingva situacio en multnacia Kazaĥio

Wiaczesław NASRETDINOW

Kazachstan/Kazaĥujo/Kazakhstan

Nuntempa Kazaĥio estas hejmo ne nur por kazaĥuloj, sed por multaj aliaj nacioj, kies pra-avoj laŭ volo de la sorto en diversaj jaroj venis ĉi tien. Ĝis disfalo de Sovetunio rusa lingvo estis ĉefa lingvo en tuta granda lando, kaj naciaj lingvoj ne evoluis bone kaj iliaj uzado estis limigita. La sama situacio estis en iama Kazaĥio. Tamen poste, kiam la lando ricevis sian sendependecon, rolo de rusa lingvo iom post iom komencis malpliigi kaj kazaĥa lingvo ricevis ŝtatan statuson.

La “Leĝo pri Lingvoj” reguligas la uzadon de lingvoj en la Respubliko de Kazaĥio. Ĉi-tempe trilingveco (kazaĥa kiel oficiala lingvo, rusa kiel interkomuna lingvo kaj angla lingvo kiel internacia) estas unu el ĉefaj partoj de la Kazaĥia lingva politiko kaj jam funkcias en nacia sistemo de edukado.

Krome, ekde 2017-a jaro oni komencis preparadon por ŝanĝi uzatan skribsistemon de cirila al la latina alfabeto. Uzado de la nova skribsistemo atendeblas post 2020. Nuntempe 8 novajn alfabetojn jam oni prezentis por diskuto. Kiu scias, verŝajne, ke nova kazaĥa alfabeto estos iom simila al la esperanta. Pri ĉi tio kaj pri aliaj faktoj de nuntempa lingva situacio en Kazaĥio temos.

Adapto de pruntvortoj en Esperanto

Karina Gonçalves de Souza de OLIVEIRA

Brazylia/Brazilo/Brasil, Universidade de São Paulo, Interlingvistikaj Studoj UAM

Ĉi tiu esploro provis analizi per kiuj fonologiaj vojoj novaj radikoj eniras en Esperanton. La vortoj estis selektitaj el la revuoj Kontakto, oficiala revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ekeldonita en 1963, sendita al abonantoj en pli ol 90 landoj, kaj Esperanto, oficiala revuo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu havis sian publikigon en 1905 kaj estas sendita al

legantoj en pli ol 115 landoj, krom terminologia listo pri teknologio (Nevelsteen, 2012) kaj ankoraŭ vortoj listigitaj kiel ne vortarigitaj en la blogo <<http://vortaro-blogo.blogspot.com.br/2009/09/nepivaj-vortoj-i.html>>. Estis kolektitaj vortoj el 13 lingvoj: araba, ĉina, korea, hispana, franca, angla, japana, komia, portugala, rusa, turka, sanskrita kaj svahila. La teoria bazo, kiu gvidis la analizon, estis la Pruntvorta Fonologio (Loanword Phonology), precipe la verkoj de Calabrese & Wetzels (2009), Vendelin & Peperkamp (2006), Paradis (1988), Kang (2011), Friesner (2009), Bandeira (2013), Chang (2008), Kenstowicz & Suchato (2006) kaj Roth (1980).

Ankaŭ bibliografia esploro pri jam faritaj laboraĵoj pri la fonetiko kaj fonologio de Esperanto estas prezentita kaj komentuj pri ĝeneralaj punktoj koncerne planitajn lingvojn kaj la parolan komunumon, kiun Esperanto havas. La analizo de la korpuso montris, ke la vortoj povas esti adaptitaj kaj per la fonetika elparolo kaj per la ortografia formo de la radikoj en la origina lingvo. Krome, ni rimarkis, ke kompleksaj atakoj, kiuj ne malrespektas fonologiajn malpermesojn de Esperanto estis konservitaj; la rimo suferas, necese, influon de la morfologio kiam ĝi estas adaptita; longaj vokaloj estis adaptitaj, plej multe, kiel simplaj vokaloj; kaj ke kelkaj vortoj havas du sinkronajn formojn en la lingvo.

Adaptation of loanwords in Esperanto

This research tried to investigate by which phonological directions new roots are incorporated into Esperanto. Words were selected from the following magazines: Kontakto, official magazine of Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO - World Esperanto Youth Organization), which was first published in 1963 and is sent to subscribers in over 90 countries, and Esperanto, official magazine from Universala Esperanto-Asocio (UEA – Esperanto Universal Association), which had its first release in 1905 and is sent to readers in 115 countries, in addition to a terminology list about technology (Nevelsteen, 2012) and to words not quoted on dictionaries but published on a list in the blog <<http://vortaroblogo.blogspot.com.br/2009/09/nepivajvortoj-i.html>>. Words were collected from 13 different languages: arabic, chinese, corean, spanish, french, english, japanese, komi, portuguese, russian, turkish, sanskrit and swahili. The theory basis that guided this analysis was Loanword Phonology, mostly the works of Calabrese & Wetzels (2009), Vendelin & Peperkamp (2006), Paradis (1988), Kang (2011), Friesner (2009), Bandeira (2013), Chang (2008), Kenstowicz & Suchato (2006) and Roth (1980). We also made a bibliographic search on previous works about Esperanto's phonetics and phonology, and we discussed general matters about planned languages and Esperanto's community of speakers. The corpus's analysis showed that words can be adapted by its phonetic form as well as by its root's orthographic form on the original language. Furthermore, we observed that complex onsets which do not violate phonological restrictions of Esperanto were sustained; rime, when is adapted, is necessarily influenced by morphology; long vowels were, for the most part, adapted as simple vowels; and some words present two forms in language's synchronic variation.

Kono de fremdaj lingvoj en okcidenta Eŭropo laŭ generacioj surbaze de eŭrobarometro-enketoj

Jukka PIETILÄINEN

Finlandia/Finnlando/Finland, Helsingin yliopisto

Kiel kono de fremdaj lingvoj ŝanĝiĝis en Eŭropo dum pasintaj 120 jaroj? Surbaze de enketoj kolektitaj inter 1976 kaj 2012 eblas analizi la paroladon de fremdaj lingvoj laŭ generacioj tiel ke la enketo farita en 1976 montras la lingvoscion de tiujn personojn kiuj naskiĝis en 1890-aj jaroj kaj poste. Tiel eblas grupigi la respondintojn laŭ iliaj naskiĝjardekoj kaj kompari kiel evoluis la lingvoscio inter generacioj. Plej ofte personoj atingis kapablon parole fremdan lingvon en siajn lernejarajn jarojn kaj la posta evoluo verŝajne nur marĝene ŝanĝis la situacion: aŭ la fremda lingvo forgesiĝis pro neuzo aŭ nova fremda lingvo aldoniĝis surbaze de lernado en plenkreska aĝo.

Plej longan perspektivon eblas trovi en tiuj landoj kiuj membriĝis en Eŭropa Unio en 1976 (Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Belgio, Luksemburgio, Britio, Irlando kaj Danlando) sed ankaŭ ĉe pli novaj ŝtatoj-membroj eblas distingi evoluon de lingvoscio ekde 1920-aj jaroj.

Pli frue la franca estis la plej ofta fremda lingvo en Okcidenta Eŭropo sed iom post iom la angla prenis tiun lokon. Tamen ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj parolas aliajn fremdajn lingvojn kreskis. Inter la plej junaj aĝgrupoj eblas observi ĉu la kreskanta dominado de la angla forpuŝas aliajn fremdajn lingvojn.

La plurfunkcia rolo de la Esperanta radiofonio

Barbara Pietrzak

Polska/Pollando/Poland, Pola Retradio

La kreiĝinta antaŭ 95 jaroj E-radiofonio, la unuaj E-elsendoj ludis signifan rolon en la evoluo de la E-komunumo. Diverslandaj E-elsendoj ebligis al multe pli vasta publiko la partoprenon en la E-lingva medio. Ĝis tiu epoko la diverslandan E-lingvan medion formis Universalaj Kongresoj, klubaj renkontiĝoj okaze de prelegvojaĝoj de eksterlandaj esperantistoj. La apero de E-programoj en diverslandaj radiostacioj permesis – sen forlaso de la propra loĝloko – aŭdi alilandajn esperantistojn, aŭskulti E-prelegojn kaj simile. La E-elsendoj efikis ankaŭ por la IL propagande kaj disvastige.

Tiu aspektoj de la funkciado de la E-elsendoj ne ĉesis. Evidentiĝis tamen, ke ilia rolo estis kaj povas esti pli ampleksa. Ke efektive ili havas plurajn funkciojn. Inter ili estas forigo aŭ supervenke de izoliteco en la uzo de la lingvo por esperantsitoj vivantaj dise tra la mondo. E-elsendoj plenumas krome diversfacetan klerigan rolon (ekz. instruas komprenon de la parolata lingvo, rolas kiel elemento de lingvokursa materialo, kiel liveranto de varitemaj enhavoj). Pere de E-komunumaj informoj, raportoj kaj antaŭmikrofonaj intervjuoj – ili enmovadigas kaj alproksimigas buntan E-kulturon.

Saussure en kaj pri Esperanto

Luiz Fernando Dias PITA

Brazylia/Brazilo/Brasil, Universidade do Estado do Rio de Janeiro

La libro *Kurso pri "Ĝenerala Lingvistiko"* de Ferdinand de Saussure, starigas la sciencajn bazojn de lingvistiko kaj tiamaniere inaŭguras ĝian nunan staton. En tiu ĉi verko, Esperanto estas kelkfoje menciita kaj kelkaj el siaj trajtoj analizitaj. Nia celo estas analizi la verkon kaj, en ĝi, tiujn menciojn. Tiam, pere de ili, kion pensis Saussure pri la esperanta fenomeno.

Ŝekspiro or Shakespeare: this is the question!

On a proper adaptation of proper names in Esperanto

Krunoslav Puškar

Chorwacja/Kroatujo/Croatia

The international auxiliary language Esperanto is probably the best known constructed language in the world, but also one of the most heavily criticised. Although it was meant to solve the problem of international understanding, there is still widespread and excessive criticism of Esperanto by lay people and linguists alike who think it actually cannot do so. For various reasons, they also consider it linguistically inferior to their native tongues.

As a result, this paper deals with reasons behind the unpopularity of Esperanto and other planned languages, well-known critics of Esperanto, and widely proposed changes to it. It closely examines around 15 common structural 'flaws' of Esperanto at the phonological, morphological and semantic levels, and it also tries to show that there are still significant deficits of knowledge

behind these persistent objections. It has to be pointed out that all the criticised structural characteristics in this paper are dealt with objectively and scientifically, in an attempt to show that all languages can come under close scrutiny as Esperanto often does, but being well aware that natural languages do not conform to the same rules or come under the same objections that planned languages still do.

Rimarkoj pri la lingva normo en Esperanto

Ryszard Rokicki

Polska/Pollando/Poland

La problemo de la lingva normo aĝas same kiel Esperanto mem (se ne pli). Pri ĝi okupiĝis esperantologoj reprezentantaj diversajn sciobranĉojn, laste eĉ de juroscienco. Esperantistoj estas konvinkitaj, ke ilia lingvo estas difinita unu foje por ĉiam en la Unua Libro, en la Fundamento de Esperanto kaj la Bulonja Deklaracio. Tamen tra jardekoj foj-foje aperas duboj, hezistoj eĉ abruptaj skuetoj koncernantaj diversajn lingvajn detalojn – kaj la diablo kuŝas en detaloj. Kiu(j) decidas pri (ne)ĝusteco de dubaj esprimformoj?

Ankaŭ etnaj lingvoj havas norm-problemojn kaj solvas ilin per evoluo aŭ foje per decidoj de siaj lingvaj aŭtoritataj instacoj. El iliaj spertoj la Esperanto-Movado povas tiri konkludojn kaj apliki al pritrakto de la normevoluo en sia lingvo.

Analizante elektitajn provojn influi la lingvoevoluan aŭ entrepreni kaj realigi kelkajn ŝanĝojn en la lingvo estos diskutitaj ankaŭ motivoj de ilia aperado kaj ŝancojn eviti tiajn problemojn en estonteco.

Remarks on the standard Esperanto language

The problem of standard languages is at least as old as Esperanto itself (if not older). It has been a topic of interest for Esperantologists from diverse academic fields, even lately one of law. Esperanto speakers are convinced that their language has been established once and for all in the *Unua Libro* (First Book) in the Fundamento de Esperanto (*Foundation of Esperanto*) and in the *Bulonja Deklaracio* (Declaration of Boulogne). However over the decades doubts have appeared from time to time, doubts, hesitations and even heated disputes over various points of usage – and the devil is in the details. But who decides on the (in)correctness of doubtful forms of expression?

Ethnic languages also have problems regard standardization and these are solved by natural evolution or by official decisions by language authorities. Their experiences could be used by the Esperanto movement to draw conclusions and apply them to the evolution of their language.

Selected attempts to en language evolution or undertake and carry out changes in languages are discussed as are the motives for their appearance and chances to avoid such problems in the future.

La lingvokonsciiga rolo de Esperanto

André STAES

Belgia/Belgio/Belgium, Interlingvistikaj Studoj UAM

Tiu ĉi prelego priskribas la rolon, kiun Esperanto ludis por la plifaciligo de la lernado de lingvoj. Pere de fontoj el la pasintaj 100 jaroj mi prilumas okazintajn lingvoinstruajn eksperimentojn. Mi ankaŭ donas atenton al lingvoinstruaj eksperimentoj de la 21a jarcento en Eŭropo, kiuj pristudas akcelilojn al multlingvismo. Surbaze de la akirita kono, ni donas konsilojn por lingvoinstruaj strategioj. Oni povas utiligi Esperanton por stimuli lingvan konscion dum la studo de la lerneja kaj/aŭ hejma lingvo, de aliaj modernaj kaj klasikaj lingvoj, de lingvoj de minoritatoj kaj lingvoj de migrantoj.

Dum la lernado de alia lingvo, lernantoj kreas propran 'interlingvon'. Lernantoj malofte korekte parolas lingvon, kiun ili lernas. Ili parolas lingvaĵon, kiu situas inter la propra kaj la lernenda lingvo. Mi proponas doni al Esperanto la rolon de 'interlingvo'. Tio plibonigos jen la akirajn, jen la produktivajn kompetentojn dum la lingvolernado. Ĉefe la parolkuraĝo antaŭeniros. 'Esperanto kiel lingvokonsciiga interlingvo' (koncize: Esperanto kiel interlingvo) havas similan funkcion kiel la programlingvoj 'Logo', 'Scratch' aŭ 'Python' por infanoj. Temas pri enkondukaj lingvoj, sed samtempe, ankaŭ pri plenvaloraj programlingvoj. Ekzistas alia metafora komparo malpli nova: Kutime infanoj lernas unue muzikumi per fluto kaj poste per saksofono, kaj prefere ne inverse. Koncize, ni emfazas distingi 'simplajn kaj facilajn strukturojn' disde 'malsimplaj kaj malfacilaj strukturoj', kaj serĉi vicordon por instrui ilin. Gravas la interŝanĝeblecoj aŭ alternativaj solvoj por esprimi la saman semantikan enhavon per alia frazo- kaj vortostrukturo. Tiu elirpunkto estas la kerno de mia prezentaĵo.

The facilitating role of Esperanto for language learning

In this presentation describes the role Esperanto can fulfil in facilitating the learning of languages. I shall highlight language experiments that have occurred, by means of sources of the last century. I shall also pay attention to language experiments of the 21th century in Europe, that study the tools of acceleration of multilingualism. The acquired knowledge will serve to develop new strategies for language learning. One can use Esperanto to stimulate language awareness while studying the language spoken at school and / or at home, other modern and classic languages, languages of minorities and languages of migrants.

While studying another language pupils or students create an 'interlanguage'. Usually students and pupils don't speak the language they are learning properly. They speak something in between. I propose to let Esperanto play the role of an 'interlanguage'. This will increase receptive and productive competences. Especially the courage to speak will improve. 'Esperanto-awareness-interlanguage' has a similar function as the program languages 'Logo', 'Scratch' or 'Python' for children. These are introductory languages, that at the same time, can be used as fully grown program languages. There is another and elder metaphor to remind: Children usually learn to play flute before they learn to play saxophone, and not vice versa. In short, I shall emphasize the distinction between 'simple and easy structures' and 'complicated and difficult structures', and look for an order to learn them. Interchangeability and alternative solutions to express the same semantical content by means of another structure of sentence or word order and formation are of main importance. This point of view is the kernel of my study.

Rola esperanta w ułatwianiu nauki języków obcych

W niniejszym opracowaniu opisano rolę, jaką odgrywa Esperanto w ułatwieniu nauki innych języków obcych. Za pomocą źródeł z ostatnich 100 lat naświetliłem kilka dokonanych eksperymentów językowych. Zwracam również uwagę na językowe eksperymenty w XXI wieku w Europie, które badają przyspieszenie wielojęzyczności. Na podstawie uzyskanej wiedzy udzielam porad dotyczących strategii nauczania języków obcych. Esperanto może być wykorzystane do stymulowania świadomości językowej podczas nauki języka szkolnego i/lub języka ojczystego, innych języków nowoczesnych i klasycznych oraz także języków mniejszościowych i języków migrantów. Podczas nauki innego języka uczniowie tworzą tzw. swój język pośredni. Uczniowie rzadko mówią poprawnie językiem, którego się uczą. Posługują się odmianą pomiędzy językiem własnym i tym, którego się uczą. Proponuję nadać językowi Esperanto rolę interlingwy. To ulepszy zdobyte i produktywne kompetencje podczas nauki języka. Przede wszystkim uczniowie będą robić postępy, odważą się rozmawiać. Esperanto jako język pomostowy (zwięźle: Esperanto jako interlingwa) ma podobną funkcję jak języki programowania "Logo" "Scratch" lub "Python" dla dzieci. Chodzi tutaj o języki wprowadzające, ale jednocześnie również o pełnowartościowe programy językowe. Jest jeszcze inne starsze metaforyczne porównanie: zazwyczaj dzieci uczą się najpierw grać na flecie, a potem na saksofonie, a nie odwrotnie. W istocie podkreślam, że rozróżniamy 'proste i łatwe struktury' od 'trudnych i skomplikowanych struktur' i szukamy ciągów aby ich nauczyć. Ważne są możliwości zmiany poszczególnych elementów w danym zdaniu lub możliwości rozwiązań alternatywnych do wyrażania tej samej treści semantycznej, za pomocą innej struktury zdań i wyrazów. Ten punkt wyjścia jest podstawą niniejszej analizy.

Język międzysłowiański

Johannes Hendrik van STEENBERGEN

Holandia/Niderlando/the Netherlands

Międzysłowiański jest tzw. skonstruowanym językiem strefowym, czyli językiem pomostowym przeznaczonym dla reprezentantów jednej grupy blisko spokrewnionych języków, w tym konkretnym przypadku: słowiańskich. Językami tego typu rządzą zupełnie inne zasady niż językami globalnymi jak esperanto: głównym ich celem jest zrozumiałość bez uprzedniej nauki oraz ogólne poczucie swojskości, a znaczenie takich cech jak prostota lub neutralność kulturowa jest o wiele mniejsze. W przypadku międzysłowiańskiego oznacza to, że każdy Słowianin powinien go zrozumieć, nie wiedząc nawet, z jakim językiem ma do czynienia. Przez wiele lat słowiańska interkomunikacja, jako dziedzina na pograniczu slawistyki i interlingwistyki, była najczęściej ignorowana przez naukowców obu stron, ale w XXI wieku „interlingwistyka słowiańska” wreszcie zdobyła uznanie w kręgach naukowych.

Międzysłowiański prawdopodobnie jest najstarszym międzynarodowym językiem pomocniczym na świecie, o wiele starszym niż esperanto i volapük. Przez okres swojego istnienia język ten przeszedł różne etapy, a zwłaszcza w XIX wieku wielu autorów opublikowało w nim i/lub o nim książki i czasopisma. W epoce Internetu międzysłowiański powrócił do aktywności, a dziś dysponuje kompletną gramatyką, słownikiem online, samouczkiem w kilku językach oraz społecznością internetową, do której należy ponad tysiąc osób. W czerwcu 2017 r. odbyła się Pierwsza Konferencja Języka Międzysłowiańskiego (CISLa), na której większość wykładów była prowadzona w międzysłowiańskim albo tłumaczona na międzysłowiański. Był to pierwszy w historii przykład oficjalnego wykorzystania międzysłowiańskiego na międzynarodowym wydarzeniu.

W swojej prezentacji opowiem o tym, jak powstał język międzysłowiański, jak działa, jak się go optymalizuje, jako się go uczy, oraz jakie są nasze praktyczne doświadczenia z nim.

The Interslavic language

Interslavic is an example of a zonal constructed language, an international auxiliary language intended to be used among speakers of a group of closely related languages, in this particular case: the Slavic languages. Languages of this type are governed by different rules than global languages like Esperanto: simplicity and cultural neutrality are of less importance than familiarity and instant comprehensibility. In the case of Interslavic, this means that any Slav should be able to understand it without any prior learning. For a long time, the field of science that deals with Slavic intercomprehension has been neglected by scholars, but during recent years “Slavic interlinguistics” has finally gained more recognition.

Interslavic is probably the oldest international auxiliary language in the world, predating Esperanto by at least three centuries. During that period, it has gone through various stages, and many different authors have published books in and/or about it. In the digital age, it has come to life again. Today, Interslavic has a complete grammar, an online dictionary and an active community of over a thousand people. In June 2017, the First Conference on the Interslavic language (CISLa) took place. Part of the presentations were held in (or translated to) Interslavic, and it was the first time that Interslavic was officially used during an international event.

In this presentation, I will tell something (in Polish or English, depending on the audience) about how Interslavic has come into being, how it works, how intelligibility is optimized, how it is learned, and what our practical experiences are.

Esperantlingva bildo de la mondo: JUSTECO

Ida STRIA

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet Warszawski

Nuntempa esplorado pri lingva bildo de la mondo (kiel nocio evoluigita de la pola Etnolingvistika Skolo de Lublino kun bazaj konceptoj priskribitaj de la ĉefa kreinto de la skolo Jerzy Bartmiński; ekde nun LBM) fokusiĝas pri naturaj etnaj lingvoj.

En ĉi tiu kontribuo mi asertas, ke Esperanto – kvankam ĝi estas intence konstruita internacia helplingvo – evoluas nature (Stria 2015). Ĝi havas grandan komunumon, dank'al kiu Esperanto estas vivanta lingvo, kun multaj denaskaj parolantoj (Fiedler 2006, 2012; Wandel 2015).

Esperanto verŝajne estas la sola planita lingvo kun tute evoluinta originala literaturo, tekstaroj kaj vortaroj, permesante studi sistemajn datumojn kaj konsideri malsamajn nivelojn de la lingvo, nome vortostokon, idomojn, morfologion kaj sintakson kiel proponis Bartmiński (2012) kaj en la projekto EUROJOS (2008). Ĉi tiuj du faktoj permesas analizojn de ĝia LBM.

Ĉi tiu kontribuo prezentas rezultojn de studoj efektivigitaj ĝis nun de la LBM de progresintaj Esperantistoj (Koutny 2010; Stria 2016) kun ĝia fokuso sur la koncepto de JUSTECO. La studo estas parto de la projekto EUROJOS-2 kaj tial konsideras plurajn tipojn de materialo: korpusojn, vortarojn kaj enketojn. Oni devas rimarki, tamen, ke ĉiuj Esperantistoj estas almenaŭ dulingvaj kaj ke la esperanta LBM verŝajne enhavas elementojn transprenitajn de aliaj lingvoj kaj kulturoj.

Linguistic worldview of Esperanto: JUSTICE

Current research on the linguistic worldview (as a notion developed by the Polish Ethnolinguistic School of Lublin with basic concepts described by the main creator of the school Jerzy Bartmiński; henceforth LWV) is focused on natural ethnic languages.

This paper assumes that Esperanto – even though it is a deliberately constructed international auxiliary language – is developing in a natural way (Stria 2015). It has a large community, which makes Esperanto a living language with a number of native speakers (Fiedler 2006, 2012; Wandel 2015).

Esperanto is probably the only planned language with fully developed original literature, corpora and dictionaries allowing for the study of system data and taking into account different levels of language, i.e., vocabulary, idioms, morphology and syntax as proposed by Bartmiński (2012) and in the project EUROJOS (2008). These two facts allow for analyses of its LWV.

This paper presents results of studies conducted so far on the LWV of advanced Esperanto speakers (Koutny 2010; Stria 2016) with its focus on the concept of JUSTICE. The study is part of the EUROJOS-2 project and therefore takes into account several types of material: corpus, dictionary and questionnaire data. One must note, however, that all Esperanto speakers are at least bilingual and that the worldview in this language most likely will contain elements transferred from other languages and cultures.

Bartmiński, J. 2012. *Aspects of cognitive ethnolinguistics*. Zinken, J. ed. London; Oakville, CT: Equinox.

EUROJOS 2008. Available at: <http://ispan.waw.pl/default/pl/projekty-naukowe/eurojos> [Accessed: 16 January 2015].

Fiedler, S. 2006. Standardization and self-regulation in an international speech community: the case of Esperanto. *International Journal of the Sociology of Language* 2006(177), pp. 67–90.

Fiedler, S. 2012. The Esperanto denaskulo: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community. *Language Problems & Language Planning* 36(1), pp. 69–84.

Koutny, I. 2010. Esperantlingva bildo de la mondo. In: Blanke, D. and Lins, U. eds. *La arto labori kune: festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, pp. 290–305.

Stria, I. 2015. Esperanto as a Natural Language. *Język, Komunikacja, Informacja* 10, pp. 32–42.

Stria, I. 2016. *Inventing languages, inventing worlds. Towards a linguistic worldview for artificial languages*. Poznań: Wydział Neofilologii UAM w Poznaniu.

Wandel, A. 2015. How Many People Speak Esperanto? Esperanto on the Web. *Interdisciplinary Description of Complex Systems* 13(2), pp. 318–321.

Georgian Language: Current Threats and Challenges

Tamar SUCHISZWILI

Gruzja/Kartvelio/Georgia, ილიას სახელმწიფო უნივერსიტეტი (Narodowy Uniwersytet Ilia / Ilia Nacia Universitato / Ilia State University)

What are those threats and challenges that languages (non-dominant languages in particular) face in the modern time of globalization, when the progress and prosperity speaks the dominant language? And how far non-dominant languages can avoid the influences of dominant languages? How non-dominant languages can participate in the intercultural dialogue and keep their language identity at the same time? The paper provides an attempt to answer these questions and focuses on the example of Georgian language, spoken by approximately 4 million people. The example of Georgian is significant for several reasons: a) it is an official language of Georgia, a country with

language diversity and therefore, as an official language its policy is designed to protect other regional and ethnic languages; b) on the other hand, Georgian can be considered as a language whose viability is under threat. The paper presents a picture of the historical background, describes the threats existed during the Soviet regime and their follow-ups, as well as concentrates on current situation, language policy, current challenges and their reasons.

Zamenhof Poeto

Humphrey TONKIN

USA/Usono/USA, University of Hartford

Kvankam ni scias relative malmulton pri tio kion Zamenhof legis kiel junulo, ni ja scias, ke li ĉiam interesiĝis pri poezio. Lia decido jam en la komenco de Esperanto verki poemojn en la lingvo estis grava el pluraj vidpunktoj. Temas nur pri manpleno da originalaj poemoj kaj kelkaj tradukitaj (sed ni ne forgesu ankaŭ ekzemple la tradukon de Ŝekspiro kaj la zamenhofajn bibliajn tradukojn), sed tiuj poemoj estis multe pli ol nuraj eksperimentoj – kiel montros analizo de la metaforoj kaj imagaro. Kaj tio kion Zamenhof komencis tuj fariĝis poezia tradicio en Esperanto: la poezio ludis kaj ludas eksterproportcian gravecon en la evoluo de la Esperanto-literaturo kaj la Esperanto-kulturo.

Esperanto: A Language Policy Assessment

Humphrey TONKIN

USA/Usono/USA, University of Hartford

A recent sharp increase in scholarly interest in the history of Esperanto prompts an assessment of the linguistic, societal, and political influence of this language movement over 130 years of existence, particularly its intersection with language policy and planning. Traditionally, students of language planning draw a clear distinction between the planning of existing ethnic languages and the construction of entire planned languages. Corpus planning of an existing language is very different from the corpus planning of a planned language like Esperanto; and status planning of a language already in existence is different from the promotion of a fully constructed, but not yet current, language. Or is it? A few linguists, most notably Valter Tauli and Eugen Wüster, have discerned parallels between the two, or used lessons learned from constructed languages by applying them to corpus planning in existing languages. And status planning of planned languages resembles language cultivation in existing languages, particularly instances of language revival – the case of Cornish for example (Kimura, 2010, 2012), or Te Reo Maori (Krägeloh & Neha 2014).

Havaĵoj pri Ludoviko L. Zamenhof en la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

Bernhard TUIDER

Austria/Aŭstrio/Austria, Österreichische Nationalbibliothek

La Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko estas mondscale unu el la plej tradiciriĉaj lingvomuzeoj kaj unu el la plej gravaj siaspecaj institucioj. Ĝi kolektas kaj prezentas diverstipajn materialojn kaj objektojn pri la temoj Esperanto kaj interlingvistiko. Ekde sia fondo en 1927 la Esperantomuzeo disponas pri grava biblioteko, kiu oficiale nomiĝas ekde 1990 "Kolekto por Planlingvoj" kaj fariĝis dum sia naŭdekjara kolekta laboro la plej ampleksa fakbiblioteko por Esperanto kaj interlingvistiko. La instituto ne estas nur biblioteko kaj muzeo, sed ekde la fondiĝo ĝi ankaŭ kolektas diversajn arkivaĵojn.

La unua parto de la prelego donos mallongan enkondukan superrigardon pri la havaĵoj, celoj kaj aktualaj projektoj (precipe la nova retejo, la scienca blogo, la novaj diĝitaj objektoj).

En la dua parto estos prezentitaj diversaj havaĵoj pri Ludoviko L. Zamenhof: libroj, periodaĵoj, fotoj, bildpoŝtkartoj, muzeaj objektoj, afiŝoj kaj arkivaĵoj. Tiel la prelego atentigu pri ebloj esplori biografiajn aspektojn de Ludoviko L. Zamenhof (sed ankaŭ aliajn planlingvajn temojn) pere de plej modernaj bibliotekaj rimedoj kaj serĉstrategioj.

Holdings about Ludwig L. Zamenhof in the Collection of Planned Languages and the Esperanto Museum of the Austrian National Library

The Esperanto Museum of the Austrian National Library is, on a global scale, one of the richest language museums and onf the most important insitutions of its kind. It collects and makes available various kinds of materials and objects on the subject of Esperanto and interlinguistics. Since its foundation in 1927 the Esperanto Museum has important library which since 1990 has officially been named the "Collection of Planned Languages" and has become during its 90 years of work of gathering materials the broadest specialist library for Esperanto and interlinguistics. The institute is not only a library and museum but since its founding it has also collected different archives.

The first part of this presentation gives a short introductory overview on the contents, goals and current projects (especially the new website, science blog and new digital contents).

In the second part, various items related to Ludvik L. Zamenhof such as books, periodicals, photographs, postcards, museum items, posters and archives. In this way the presentation draws attention to the possibilities of researching bibliographical aspects of Ludvik L. Zamenhof (but also topics related to other planned languages) through the most modern library resources and searching strategies.

Serĉante fontojn de la Esperanta „Hamleto” el 1894 – ĉu Ludoviko Zamenhof uzis ankaŭ pola(j)n traduko(j)n?

Wojciech USAKIEWICZ

Polska/Pollando/Poland

En 1894 aperis „Hamleto” tradukita de Ludoviko Zamenhof en Esperanton. Humphrey Tonkin skribas tiurilate: „Lia celo ne estis fideleco, sed alproprigo”. En „Hamleto”, reverkita en la lingvo ekzistanta apenaŭ sep jarojn, multaj substrekas la lingvan fluecon, sed samtempe spuras simpligojn kaj aliigojn kompare kun la originalo. La demando pri la traduk-bazo(j) uzita(j) de Zamenhof restas aktuala. Ĉu temas pri la angla originalo aŭ eble pri alilingva(j) versio(j)? La celo de la nuna esploro estas serĉi latentajn pollingvajn influojn. Ĝis 1893 aperis en Pollando du tralaboraĵoj de „Hamleto” faritaj surbaze de germana versio kaj kvar plenaj tradukoj el la angla – de Józef Komierowski (1857), Józef Paszkowski (1862), Krystyn Ostrowski (1870) kaj Jan Kasproicz (1890). En 1894-95 al ĉi-lastaj aldoniĝis du pluraj tekstoj – de Władysław Matlakowski kaj Leon Ulrich. Analizo de solvoj aplikitaj en lokoj, kie laŭ David B. Gregor Zamenhof deiris de la originalo, estas montronta, ĉu iu el la polaj tradukoj prezentas sufiĉan kongruecon kun la Esperanta versio el 1894 por pretendi al la rolo de la ĉefa aŭ helpa Zamenhofa tradukfonto.

Searching for the sources of the Esperanto “Hamlet” from 1894 – did Ludwik Zamenhof also use Polish translation(s)?

In 1894 the Esperanto translation of “Hamlet” by Ludwik Zamenhof appeared. Humphrey Tonkin wrote “His goal was no fidelity but appropriation”. In “Hamlet” reworked in a language existing at the time for only seven years many have underlined the language fluency while at the same time he follows simplifications and alterations compared with the original. The question regarding the translation base(s) used by Zamenhof remains unanswered. Was the English original or rather versions in (an)other language(s) used. The goal of this presentation is to search for latent Polish influences. By 1893 two versions of Hamlet were available based on the German version while there were four full translations from the English by Józef Komierowski (1857), Józef Paszkowski (1862), Krystyn Ostrowski (1870) and Jan Kasproicz (1890). In 1894-95 two more versions were added by Władysław Matlakowski and Leon Ulrich. An analysis of the solutions applied in places where David B. Gregor Zamenhof thinks the text differed from the original, the answer to the question whether one of the Polish translations presents sufficient congruence with the Esperanto version from 1894 is shown in order ascertain the role of the primary or auxiliary source of the Zamenhof translation.

The role of languages in the European Union – now and in the future

Reinhold UTRI

Polska/Pollando/Poland, Uniwersytet Warszawski

Although there was some discussion about the working languages in the European Union, English, French, German and at a lower extent other national languages are accepted in organisations of the European Union. Natives of English have some advantages in political discussions. As the European Union enlarged the amount of member countries quite a lot (Rumania and Bulgaria in the year 2007, Croatia in 2013, Albania, Montenegro and Serbia in the future), the matter of

translation of many documents into all the national languages is also a matter of financing. This paper discusses the possibilities of language use from a linguistic point of view and from the view of a representative of a non-dominant language. Would Esperanto as one of the best „artificial“ languages be an option? Would another international language be possible? Is it an option after the Brexit that English stops being the dominant language in the European Union without Great Britain?